

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 50, Aprilo 2022



La turo Karlatornet, vidata de Stenpiren.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo.....	2	Humuro el la jaro 1904 .....	20
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Malofta vizito al Smögen .....	21
Espeporko meditas en aprilo .....	3	La granda kuiristo en Svedio, Leif Mannerström.....	22
La Karla-turo en Gotenburgo .....	4	Rimedo en la jaro 1880 se mankis importitaj komercaĵoj.....	22
El "Liberaj vortoj" en Göteborgs-Posten la 30an de marto.....	4	Artikolo de Språkförsvaret (La lingvodefendo).....	23
Jarkunveno kun Esperanto-Societo de Gotenburgo la 12an de marto.....	5	El Sat.iroj, finvenka revuo pri ŝercoj, Aŭstrio.....	26
Sentenco de la saĝa strigo.....	6	Finns det skalbaggar i Skara?.....	26
La hundo Jaro .....	7	La distanca Ture Sventon.....	27
Börringevråken.....	7	Eta libreccenzo .....	28
Savu la papiliojn!.....	7	Kara muŝo .....	29
Sahara polvo en Aŭstrio 2022 03 .....	8	Tiel aspektas la bulteno de la Londona Esperanta klubo .....	29
Somardagar i Göteborg.....	8	Ekspozicio, en kiu ankaŭ Ora Ĵurnalo ĉeestas .....	30
Snösparven.....	9	Imagu, ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo estas jam la 50a! .....	30
Printempa promeno en la orienta parto de Svedio.....	10	Kelkaj pioniraj svedinoj.....	31
Vizito en Skövde .....	11	Maljunuloj ekzerciĝas en Ĉinio. El maljunulejo .....	32
Antaŭ 10 jaroj la Esperanto-klubo de Skövde havis 80-jaran naskiĝtagon.....	12	Indas montri arton, Torben Svendsen, Danio, asertas .....	33
Facilas diri "neŭtraleco". Malfacilas esti neŭtrala.....	12	11 – dek unu .....	33
Aida Cerkez.....	13	Printempa promeno kun Kal kaj Ada.....	34
Kalle Kniivilä: Rusio kaj Ukrainio .....	14	La 100 plej legendaj tradukaĵoj.....	37
Strofo el Preĝo sub la verda standardo.....	15		
La politikisto Rickard Nordin, intervjuita de Ingegerd Granat .....	16		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperanto-bibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68. Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com).

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com). Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



## Espeporko meditas en aprilo

- ☆ Malofte Göteborgs-Posten akceptas kontribuon pri Esperanto. Sed se oni aludas aktualan temon – tiuokaze la manko de interpretistoj por ukrainaj rifuĝintoj – fakte nun oni akceptis leteron al la redaktoro. Dank' al la atento, grupo volas komencantan kurson en Lerum aŭtune.
- ☆ Alia interesa efiko de la sciigo ke Esperanto vivas, estas ke entreprenisto kontaktis nin por havi proponon pri esperanta nomo de sia nova entrepreno.
- ☆ Komprenoble kelkaj artikoloj temas pri Ukrainio. Samtempe estas diskuto pri kiom multe decas ke ni publikigu politikajn opiniojn. Ĉiu artikolverkinto ja mem respondecas pri sia skribo. Ni bonvenigas artikolon de Renato Corsetti, kiu klarigas sian sintenon al neŭtraleco.
- ☆ Ankaŭ svedaj politikistoj interesas min. En septembro estos ĝenerala elekto.
- ☆ Ingegerd intervjuis la centropartian parlamentanon Rickard Nordin. Aktualaj aferoj estas energio, la medio, la lernejoj kaj demokratio kaj – ĉu Esperanto interesas la partiojn?
- ☆ La lingvodefendo – Språkförsvaret – havas interesan taktikon. Oni sendis skribojn al ĉiuj politikaj partioj demandante ĉu ili volas labori por fortigi la statuson de la sveda lingvo en Svedio. Ĉu ankaŭ ni faru la saman pri Esperanto? Almenaŭ ni atentigu la parlamentaron ke troviĝas lingva problemo.
- ☆ Ingegerd daŭre rakontas pri Gotenburgo. Ĉi tiun fojon la statuo Pozidono forlasas sian lokon je la Avenuo kaj promenas kun Kalle kaj Ada tra la urbo.
- ☆ Iam Skövde havis viglan esperanto-klubon, sed nun mankas membroj kaj ni invitas la malmultajn esperantistojn membriĝi al la Gotenburga klubo.
- ☆ "Ni estis la unuaj (1 kaj 2)". Tio estis la titolo de du prelegoj en mia komunumo, fare de Margareta Björk, pri svedaj inaj pioniroj, entute 24 virinoj. Je la fino de la magazino mi prezentas du el ili, en venonta numero eble pliajn. La aŭskultantaro konstatis ke la patroj havas grandan rolon, patroj kiuj instigis siajn filinojn al edukado, trejnado, parolado, politikado k.t.p. Malmultaj virinoj povis kombini edziĝon kaj familion kun siaj specifaj fakoj, en kiuj ili estis pioniroj. La socio ankaŭ igis ilin batali kontraŭ malnovaj tradicioj. Ĉu virinoj ankoraŭ devas batali?
- ☆ Nova librorondo per Zoom komenciĝos la 24an de aprilo kun Nick kiel gvidanto. Ĉu vi volus partopreni? –Tiuokaze: havigu al vi la libron "Sur bluaj planedoj" de Laure Patas d'Illiers kaj doni al ni vian retadreson!
- ☆ Indas montri arton en Ora Ĵurnalo, Torben Svendsen, Danio, asertas. Belaj statuoj, strangaj statuoj kaj enigmaj statuoj! Ĝuu!

/Siv

# La Karla-turo en Gotenburgo

(ankaŭ sur la unua paĝo)

## La plej alta Nordia loĝdomo.

Se vi volus loĝi supre en la ĉielo mi rekomendas la nun konstruatatan domon de Serneke sur la granda insulo Hisingen en Gotenburgo. Oni atendas, ke la domo estos 245 m alta kaj havos 73 etaĝojn kie la nenifarada vivo kreskas.

Ĝi estas socia domo por vi kiu opinias, ke mastrumaj laboroj estas tedaj. Vi povos mendi purigadon kaj manĝon, bani kaj naĝi en la doma baseno, festi kaj interrilati kun la aliaj loĝantoj.

Tre modernaj apartamentoj estas nun por rezervado.

Do, ĉiuj revoj estas nun por vi! Vi povos manĝi manĝojn kiujn vi ne preparis kaj sidos en fotelo kaj vidi ĉambriston purigi, kaj la lavadon vi plusendu. Fine, nenio restos por vi fari ...

Eble la esperanta mevo flugos kaj vidos vin tie sidante kaj kaj ĝuante la manĝon kiun vi ne kuiris, hejme kie vi ne devas purigi... sed vi devas pagi la lupagon! Ho mia Dio, tre, tre multekosta!

/Ingegerd



## El "Liberaj vortoj" en Göteborgs-Posten la 30an de marto

La gotenbarga gazeto estis fondita en 1813.



## Se ĉiuj scipovus Esperanton, neniuj interpretistoj estus bezonataj

Fluego da rifuĝantoj post fluego da rifuĝantoj aktualigas nian bezonon de interpretistoj. Kiel ni trovu interpretistojn por ĉiuj, kiuj venas? Se la mondo havus komunan pontolingvon, interpretistoj ne estus bezonataj. Kiam la mondo komprenos, ke necesas komuna mondlingvo? Mondlingvo ne devas esti ligita

## Om alla kunde esperanto skulle inga tolkar behövas

Flyktingvåg efter flyktingvåg aktualiserar vårt behov av tolkar. Hur ska vi hitta tolkar till alla som kommer? Om världen hade ett gemensamt brospråk skulle tolkar inte behövas. När ska världen förstå att ett gemensamt världsspråk behövs? Ett världsspråk får inte vara knutet till något

al iu unuopa lando. Mondlingvo devas esti logika, nuancita, justa kaj relative facile lernebla. Ni, kiuj uzas Esperanton pli malpli ĉiutage por "havi kontakton kun la mondo", malfacile komprenas la kontraŭstaron al Esperanto.

Se lernejoj en la tuta mondo estus investintaj en Esperanton anstataŭ en la anglan, multe da tempo estus gajnita – tempo kiu tiam povus esti uzata por lerni la anglan, rusan aŭ ĉinan, se oni volus.

La konstruo de Esperanto estas genia. Vi konstruas vortojn – same kiel vi kunmetas Lego-brikojn – kaj ricevas multajn novajn vortojn el unu vortradiko. Ĝi ne postulas ekstreman memoron, sed postulas pli grandan logikan pensadon. La prononco estas lernata en 30 minutoj. Ni ofte jam konas la vortradikojn, ĉar ili estas kutime internaciaj kaj 80 elcentoj baziĝas sur la latina.

*Ingegerd Granat, Folke Wedlin kaj Siv Burell,  
La Esperanto-Societo de Gotenburgo.*

enskipt land. Ett världsspråk måste vara logiskt, nyansrikt, rättvist och relativt lätt att lära sig. Vi, som använder esperanto mer eller mindre dagligen för att "ha kontakt med världen" har svårt att förstå motståndet mot esperanto.

Om skolor i hela världen skulle ha satsat på esperanto i stället för engelska, skulle mycket tid ha vunnits – tid som sedan kunde användas för att lära sig engelska, ryska eller kinesiska, om man så önskar.

Esperantos konstruktion är genialisk. Man bygger ord – som man bygger lego – och får av en ordstam mängder av nya ord. Det ställer mindre krav på superminne, men större krav på logiskt tänkande. Uttalet lär man sig på 30 minuter. Stammarna känner vi ofta redan till, eftersom de oftast är internationella och till 80 % bygger på latinet.

*Ingegerd Granat, Folke Wedlin och Siv Burell,  
Göteborgs Esperantoförening.*

## Jarkunveno kun Esperanto-Societo de Gotenburgo la 12an de marto

La jarkunveno ne similas al tiu sur la bildo – tamen iomete.

15 "realaj personoj" ĉeestis ekde la 12a horo, sed la plejparto antaŭe ĉeestis esperantan trejnadon en du grupoj.

La bildo ankaŭ povus simboli nian emon bonvenigi membrojn de la Esperantoklubo de Skövde al la gotenburga klubo se/kiam la malmultaj membroj en Skövde decidis malestabliti sian societeton. Ni ankaŭ povas enloĝigi iliajn librojn. Estu bonvenaj, Skövde-anoj kaj Skövde-libroj!! /Siv

### **Pri la kunsido Andreas nun raportas:**

La estraro restos la sama: Ingegerd Granat prezidanto, Siv Burell vicprezidanto, Magnus Löndén kasisto, Andreas Nordström sekretario, ceteraj estraranoj Margareta Andersson kaj Jan-Ove Ahlm. La revizoroj ankaŭ restos la samaj: Ralf Jalming kaj Bo



Lyckegård kun anstataŭanto Ingrid Vallin. Oni decidis ke la klubo reenkondukos lokan membrotizon ekde 2023 de 100 SEK. Tamen ĝi estos libervola. Oni ankaŭ malfondis la asocieton Nilssonska fonden, kies kapitalo iru al Esperanto-Societo por la elspezoj de la biblioteko en Stannum.

## La fono de la asocieto

La esperantisto Ernst Sigfrid Nilsson mortis en 1959 kaj esprimis en sia testamento, ke lia postlasaĵo estu uzata por fondi Esperanto-bibliotekon en Gotenburgo. La testamento tamen ne estis jure aprobita, sed la heredantoj, la gefratoj de Ernst, tamen donacis parton de la kapitalo al reprezentantaro de la gotenburgaj esperantistoj por fondi la bibliotekon. La Senprofita fondaĵo de tekstila laboristo E. S. Nilsson (neformale nomata Nilssonska Fonden) formiĝis en marto 1981, kun la Esperanto-Alianco de Gotenburgo kiel komisiinto. Ties membroj estis la tiamaj diversaj esperantokluboj en Gotenburgo. (La fonduso ne estas laŭleĝe fondaĵo, sed asocio.) Al la kapitalo aldoniĝis monsumo, kiu estis iam kolektita por la celo starigi ian esperantostatuon en Esperantoplatsen en Gotenburgo, sed la celo ne estis realigita (sed en 2008 la urbo tamen mem faris instalaĵon en Esperantoplatsen kun Esperanta temo).

En januaro 1982 interkonsento estis farita kun la Urba biblioteko de Gotenburgo, ke la Nilsson-fonduso aĉetos Esperantan literaturon kaj ke la libroj estos deponitaj ĉe la Urba biblioteko. Inter 2012 kaj 2014 la lokaloj de la Urba biblioteko estis renovigataj kaj la biblioteko deklaris ke ili ne plu volas agnoski la interkonsenton, pro spacomanko

en la lokaloj, kaj la fonduso estis devigita forpreni la deponitajn esperantolibrojn el la biblioteko. La ceteraj gotenburgaj esperantokluboj estas jam malaperintaj kaj nun restas nur Esperanto-Societo, kiu ja havas esperantobibliotekon en Stannum en la gotenburga regiono. Do, la volo de Ernst povas realiĝi per tiu biblioteko kaj ne plu estas bezonata aparta organizo por administri la Nilsson-fonduson. Tial ni nun malfondis la fonduson kaj Esperanto-Societo uzos la monon por la biblioteko en Stannum.

La kialo ke daŭris tiom longe antaŭ ol tiu decido estis farita, estis ke iam en la 80-aj jaroj la advokato de la postlasaĵo de Nilsson petis la fonduson transpreni kelkajn senvalorajn terpecojn, kiuj apartenis al Nilsson. En la lastaj jaroj ni faris esplorojn ĉu eblas forvendi la pecojn ĉe malfondo de la fonduso. Evidentiĝis ke la transdonado de la terpecoj al la fonduso ne fariĝis jure efektivigita kaj la fonduso fakte ne posedas la terpecojn, kvankam oni dum jaroj kredis tion kaj eĉ pagis kotizojn por la prizorgado de la terpec-apudaj vojetoj! La advokata firmo estas jam delonge malaperinta. Ĉar la terpecoj estas senvaloraj ne indas provi en la juraj instancoj efektiviigi la iaman transdonadon kaj cetere ni ne povas trovi ian dokumenton pri la transdonado kaj la nomo de la fonduso eĉ ne troviĝas ĉe la oficiala instanco pri tergrundoj.

## Sentenco de la saĝa strigo

Kiel vi vokas en la arbaro vi havas respondon.



## La hundo Jaro

*Felikso:* Jen mia hundo. Lia nomo estas Jaro.

*Paŭlo:* Stranga nomo. Kial "Jaro"?

*Felikso:* Ĉar "Dekdumonatoj" estus tro longa.

*Foto 2022, Walter Klag, Aŭstrio (Stirio)*

*Kun saluto de Walter*



## Börringevråken

*Börringevråken* estas fakte buteo kun tre hela plumaro en malsamaj varioj. La nomo devenas de la skania vilaĝo "Börringe" kie kelkaj birdobservantoj antaŭ multaj jaroj malkovris tre helan buteon kaj nomis ĝin laŭ la vilaĝo. Oni povas mencii, ke ĝi ankaŭ estis vidita en aliaj areoj. Feliĉa tiu, kiu ekvidas ĝin! Ĉiuokaze tio okazis al nia kapabla birda fotistino Renate Säfström.

*Börringevråken är egentligen en ormvråk med mycket ljus fjäderskrud i olika variationer. Namnet kommer från den skånska orten "Börringe" där några fågelskådare för många år sedan upptäckte en väldigt ljus ormvråk och uppkallade den efter orten. Det kan nämnas att den även setts i andra trakter. Lycklig den som får se den! Det fick i alla fall vår fina fågelfotograf Renate Säfström. /Ingegerd*



*Fotis Renate Säfström.*

## Savu la papiliojn!

Pro la klimata varmiĝo kaj malpliigo de la vivmedioj la papilioj rapide malmultiĝas en la mondo. Ekzemple 99,9 % de la monark-papilioj malaperis post la 80-aj jaroj en Nord-Ameriko. En Eŭropo la situacio estas plej maltrankviliga en Nederlando kaj Danlando. Feliĉe ne estas tiel malbone por la papilioj en Svedio kaj Norvegio, sed ankaŭ ĉi tie ni devas




*La monark-papilio.*

esti observemaj. Ekz. nia aŭguranto pri la somero, la citrona papilio, estas dependa de la ĉeesto de nur du arbospecioj: ramno kaj frangolo. Vi povas kunhelpi savi la papiliojn per plantado de multdiversaj floroj en via ĝardeno kaj ne forsarki ĉiom de la urtikoj.


*/Andreas (el "Illustrerad Vetenskap").*

## Sahara polvo en Aŭstrio 2022 03

Ŝtormoj ofte pelas polvon el Sahara sablo trans la Atlantikon kaj sterkas la praarbaron en Suda Ameriko. Foje tiu polvo venas ankaŭ al Eŭropo. Oni vidas ruĝajn nubojn. Kelkfoje en la jaro oni rimarkas tiun ruĝan substancon sur aŭtoj kaj tegmentoj en Vieno. Plej ofte ĝi tuj malaperas kun la pluvo. Sed la 16an de marto 2022 ni rimarkis la polvon sur nia balkono en la formo de ruĝaj strioj – vidu la foton.



**Renate kaj Walter Klag, Vieno**



<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/sahara-staub-109.html>

Der Sahara-Staub erreichte inzwischen auch Bayern – und zieht weiter nordwärts. Bild: dpa

*Sommardagar i Göteborg 2022 -  
Välkommen till en kurs i  
Esperanto*

– ett logiskt och spännande språk med globala ambitioner.



**Plats:** Vuxenskolan, Karl Gustavsgatan 15, Göteborg. **Grupper** på tre olika nivåer. **Tid:** må 20 juni – to 23 juni kl. 10 – 15. Sista dagen gör vi en halvdagsutflykt och prövar att tala esperanto. Avgift 100:–/dag = 400:– Studerande ungdom – halva priset.

**Arrangörer:** Göteborgs Esperantoförening, Esperanto-lärarnas förbund (ILEI) och Studieförbundet Vuxenskolan. Läs mer på vår hemsida: [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org).

**Esperanto-Societo de Gotenburgo**

e-post: [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se) ; pg. 436 12-1 Mer info: Siv Burell : [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)



# Snösparven

de Renate Säfström



**Eta neĝpasero havas pensojn laŭ la tempo...**

Ŝtono sur ŝtono ĵetas ombrojn  
for de mallumo sed kien?  
Fuĝu kun espero kaj esperu  
aŭ  
renkontu kun flugiloj kiuj subtenas.



**En liten snösparvs funderingar kan ligga i tiden...**

Sten på sten kastar skugga  
bort från mörker men vartåt?  
Fly med hopp och hoppas  
eller  
möt med vingar som bär.

  
**FOTO**  
FÖR LIVET



# Printempa promeno en la orienta parto de Svedio

Sten Johansson vagis kaj fotis.

Roka muro



Imagu ke Hepatikoj povas...



Mutaj cignoj



Belvidejo denove



Kampanilo ĉe eksa marmormino



Polipodio



Jen mino minacas min



# Vizito en Skövde

Vendrede la kvaran de marto, kelkaj esperantistoj el suda Svedio vizitis Skövde. Sten Svenonius estis la plej suda, el Malmö, la ceteraj estis la gotenburgoj, Siv, Ingegerd kaj Andreas. Sten kaj Andreas laboras precipe por la estonteco de la esperanta movado en Svedio.

Ĉiuokaze, ni alvenis al Skövde per la Stokholma trajno, en la ĝusta tempo, notu bone! Tie renkontis nin Birgitta Anevik, kiu jam mendis tagmanĝon en restoracio sur la granda placo. Preskaŭ ĉiuj manĝis malsamajn manĝaĵojn, sangopudingon, bifstekon kaj vegetaran manĝadon kaj la etoso ĉiam estis bona. La manĝado vere bongustis.



*"Stadshotellet", la granda hotelo en Skövde.*



Sataj kaj kontentaj post tio, ni iris al la "esperantoĉambro", kie dum multaj jaroj agadoj kaj kursoj estis faritaj. Nun estas Gunnar kaj Birgitta kiuj batalas kontraŭ la vento.

Malgraŭ tio, ke Skövde estas universitata urbo, la intereso pri Esperanto ne falis en bonan grundon dum la lastaj jaroj. Kiel tio povas esti? Kial homoj de Skövde ne uzas "mondlingvon" ...

Surloke en la malgranda kela ĉambro, ni vidas la tutan mondon sur du muroj, multaj Esperantaj libroj estas sur bretoj kaj kuireja sekcio kun lavujo kaj kafmaŝino atestas komfortajn renkontiĝojn. Sten Svenonius rakontas kiel li pensas pri la estonteco, revoj pri POD-radio venas de li kaj revoj pri Esperanto-muzeo venas el Gotenburgo per Siv kaj mi.



Siv kaj Birgitta vere estas du batalantoj por disvastigado de Esperanto. Nu, mi scias, ke estas pliaj, sed Siv kaj Birgitta estis en Skövde hodiaŭ kaj tial fiksiĝis en la bildo. Gunnar kaj Andreas fariĝis same. Kio okazos per ĉi tiu kunveno? La estonteco montros.

Sed, holá, homoj en Skövde, kial vi ne volas esti iom "internaciaj" kun la helpo de Esperanto, kiu kondukas al tiom da mirindaj kontaktoj tra la tuta mondo?



*Ingegerd*

## Antaŭ 10 jaroj la Esperanto-klubo de Skövde havis 80-jaran naskiĝtagon

en 2012–10–17

Skövde Esperanto-Klubo hodiaŭ fariĝas 80-jara. La jeno legeblas en malnova dokumento:

”La iniciatintoj de Skövde Esperanto-Klubo estis la kamaradoj Emil Falk, Johan Eriksson kaj Sune Eriksson, kiuj kunvokis interesatajn personojn al kunveno en la kafejo Margareta, lundon, la 17-an de oktobro 1932.”

Kaj jen iomete malgaja dokumento, publikigita en gazeto kaj trovita en kluba dosierujo.

Gazettondaĵo (el *Politiken* en la 70aj jaroj):

”**La lastaj entuziasmuloj**

En la 1930-aj jaroj, Esperanto estis la plej studata lingvo ĉe ABF (Laborista Kleriga Asocio).



Esperanto kunigus la laboristojn kaj faciligus la lukton kontraŭ internacia kapitalismo. Ekde tiam la angla ekregis, kaj en la lernejo kaj ĉe ABF.”

/ Birgitta Anevik

## Facilas diri ”neŭtraleco”. Malfacilas esti neŭtrala.

Neŭtraleco estas ruĝa fadeno, kiu trakuras la tutan historion de la movado. Oni trovas ĝin en la himno ”sur neŭtrala lingva fundamento” kaj oni trovas ĝin en multaj el la kongresaj paroladoj de Zamenhof.

En la 3-a universala kongreso en Kembriĝo, en kiu li iom longe insistis pri neŭtraleco, li diris:

”Vi ofte aŭdis pri la neŭtraleco de niaj kongresoj [...] ĉio, kio neniun ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio [...] devas esti ĝuste la esenco de niaj kongresoj [...]”

Aliflanke la historio de la movado estas plena je akuzoj inter esperantistoj pri rompo de neŭtraleco. Tio komenciĝis en la tempo de la unua mondmilito.

Laŭ la Plena Ilustrita Vortaro, la vorto ”neŭtrala” signifas: ”Ne partoprenanta, nek

volanta partopreni en diskuto, konflikto, milito”. Sed, konante la homan naturon, tio estas ebla nur pri aferoj, pri kiuj oni estas indiferenta.



Tamen la statuto de Universala Esperanto-Asocio diras en la artikolo 5-a:

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj.

Sed ni venu nun al la nuna internacia situacio kaj al neŭtraleco pri ĝi. Laŭ mi ni vivas en epoko precize simila al tiu, pri kiu parolis Orwell en la romano *1984*. Ni havas tri potencojn. Ili estas Usono, Rusujo kaj Ĉinujo, kiuj konkurencas inter si per ĉiuj rimedoj armeaj, politikaj, komercaj por pligrandigi sian influon, kaj malhelpi la aliajn.

## Aida Cerkez

Aida Cerkez estas verkistino, direktoro kaj redaktisto kun 20-jara sperto en raportado pri la balkana regiono por ĉefaj internaciaj amaskomunikilaj organizaĵoj. Ŝi naskiĝis en Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino en 1962, kaj kreskis en eksa Jugoslavio kaj Germanujo. Aida Cerkez iĝis kapo de la agentejo en Sarajevo de la Associated Press (AP) en 1994, dum la bosnia ĉefurbo estis sub sieĝo.

Ŝi prenis respondecon por la monitorado de la AP dum la daŭranta konflikto per vorto kaj bildo, same kiel por la administrado de loĝistiko kaj sekureco por pli ol dekoj da lokaj dungitoj ĉe tri kampaj oficejoj kaj por vizitado de korespondistoj.

En 1995, s-ino Cerkez de la Associated Press gajnis la premion Gramling por plej bone administrita amaskomunikila agado. Aktuale en 2009, Aida Cerkez ankaŭ respondecas pri planado de la regionotelevida priraportado de la AP. En 2005, Aida Cerkez aliĝis al la estraro de la Center for Investigative Journalism de la Universitato de Novjorko, bazita en Sarajevo.

**Riksablo, esperantisto el Anglio, legis la jenan kortuŝan artikolon kaj sendis ĝin al Ora Ĵurnalo. Supozeble ĝi estis origine skribita en la serbokroata, sed estas esperantigita el la angla versio de Riksablo kaj la Skiptona Esperantogrupo.**

**Jen la mesaĝo, kiun Aida Ĉerkez sendas al ukrainaj civitanoj:**

”Karaj amikoj, homhelpaj organizaĵoj en Sarajevo kolektas helpon por vi, kaj mi sidas

Esti neŭtrala en ĉi tiu situacio estus provi konstrui pontojn inter la tri blokoj kaj klopodi teni ilin en ekvilibro kaj en paco, kaj savi la planedon. Sed kiu pretas por tio? Se la okazo estas uzata por detrui pontojn, tiam prefere oni silentu.

**Renato Corsetti**

(La teksto estas mallongigita.)



ĉi tie antaŭ la ŝranko en mia loĝejo, provante eltrovi, kion vi plej bezonas nun. Vi ne plej bezonus miajn varmajn ŝtrumpetojn, jakon aŭ botojn. Ne. Sed jen mia 30-jaraĝa T-ĉemizo, presita per la slogano, kiu vivtenis min dum la 1425 tagoj, kiam armitaj malamikoj laŭvole pafis kaj sieĝis mian urbon. Tiuj tagoj, kiam mi apenaŭ pluvivis – kun nek akvo, nek manĝaĵo, nek elektro, nek hejtado, kaj sen komunikado kun la ekstera mondo.

Mi portis tiun ĉemizon kaj legis ĝian mesaĝon dum pli ol 2 milionoj da obusoj falis sur niajn kapojn, kaj me evitadis kuglojn sennombrajn. La T-ĉemizo diras: Sarajevo estos. Ĉio alia pasos.

Malhelaj tempoj atendas vin, miaj amikoj. Sed, jen, armilojn oni sendas al vi por ke ili defendu vin. Ni bosnoj kontraŭbatalis, sed la mondo trudis armilan embargon al ni. Ĝi ne komprenis tion, pri kio oni batalis en Sarajevo. Dank’ al Dio, ĝi nun komprenas en Kievo.

Vi malsatos, vi soifos, vi estos malvarmaj, malpuraj, elĉerpitaj. Vi perdos viajn hejmojn,

viajn amikojn kaj viajn familianojn. Sed, kio plej dolorigos, tio estos la mensogoj. Mensogoj tiaj: ke vi iel kulpas pri tio, kio okazas je vi! Mensogoj tiaj: ke vi efektive faras tion, kion oni faras al vi! Tiuj mensogoj traboros sennombrajn truojn en viajn korojn, kiel kugloj, sed ne povos haltigi iliajn batadojn nek frostigos ilin.

Mi vidas, ke ili detruis vian televidan turon en Kievo. Ha! Ili volas teni vin en mallumo, samkiel ili tenis nin. Ili volas malŝalti la lumilojn por ke ni ne vidu tion, kion ili faras al vi.

Skribu ĉion, kio okazos. Registru, filmu tion. Iutage, ĉio ĉi difinos vian historion. Ĝi sciigos la naskotajn Ukrainojn pri tio, kio okazas hodiaŭ, kaj plej verŝajne ĝi iĝos atestaĵo en jura tribunalo, kontraŭ tiuj, kiuj nun provas mortigi vin.

La pleja malbono ankoraŭ estontas. En la malhelaj venontaj tempoj vi kelkfoje perdos esperon; sed jen mi, skribanta al vi el la estonteco. Kaj mi diras al vi: vi venkos! Samkiel ni venkis.

Mi devintus morti, sed mi travivis, kaj morgaŭ mi promenos kun miaj genepoj. Ankaŭ vi faros tion iutage!

Mi vidas en vi la saman travivpovon, kiun mi vidis ĉi tie en Sarajevo. Mi aŭdas vin kanti la himnon de via lando, dum vi nudmane forpuŝas la tankojn. Tra la jaroj, vi kantos, kiel ni kantis, novajn kantojn pri via kuraĝo dum tiu ĉi afliktado kaj elpensos viajn proprajn sloganojn, kiuj vin vivtenos.

Sed nun, je tiu ĉi momento, mi sendas al vi la plej valoran aĵon, kion mi posedas – la sloganon sur mia T-ĉemizo, iom modifitan por vi: **Ukrainio ekzistos! Ĉio alia pasos! Gloro al Ukrainio!**

## Kalle Kniivilä: Rusio kaj Ukrainio

De Youtube mi prenis la jenan ligilon. Vi povus aŭskulti unuhoran intervjuon kun Kalle Kniivilä. Sen eĉ unu superflua vorto li klarigas la komencon kaj la daŭrigon de la milito en Ukrainio.

Mi ne kaptis de kie venis la publiko, sed verŝajne estas kanadaj esperantistoj, kiuj metis la ligilon. Foje estas malfacile kapti la demandojn, sed laŭ la respondo oni divenas pri kio temas. /Siv

[https://www.youtube.com/watch?v=\\_M1k5wnvbg](https://www.youtube.com/watch?v=_M1k5wnvbg)



Per siaj libroj kaj artikoloj en Sydsvenska Dagbladet Kalle Kniivilä estas la ĵurnalisto kaj verkisto, kiun oni prefere invitas por de li ekscii pri la aktuala situacio de la milito okazanta pere de Vladimir Putin.

## Kiu estas mi – Kalle Kniivilä?

*Vem är jag – Kalle Kniivilä (kniivila.net)*

Mi laboras kiel ĵurnalisto ĉe Sydsvenskan ekde 1997, kie mi antaŭe estis eksterlanda redaktoro interalie.

De septembro 2018 ĝis aŭgusto 2019, mi estis en forpermeso de Sydsvenskan por labori ĉe la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, unue kiel gazetara konsilisto ĉe la ambasado en Moskvo kaj poste ĉe la ambasado en Kyiv.



*Pressbilder*

Ekde septembro 2019, mi denove estas raportisto ĉe Sydsvenskan. Mi verkis ankaŭ kvin librojn: **La popolo de Putin** (2014) pri la adeptoj de Vladimir Putin, **Krimeo apartenas al ni** (2015) pri la rusa aneksado de Krimea duoninsulo, kaj **Sovetiaj nepoj** (2016) pri la ruslingva malplimulto en Baltio.

La finna versio de la popolo de Putin, Putinin väkeä, ricevis la 2014-datita Kanava-premion kiel la plej bona nefikcia libro de la jaro. La finna versio de la sovetia nepo, Neuvostomaan lapst, estis nomumita por la Grandioza Ĵurnalisto-Premio en Finnlando en 2016. La kvara libro, **Tanjas gata**, estis eldonita en septembro 2017, okaze de la centjariĝo de la Oktobra Revolucio. Temas pri ĉiutaga historio sur strato en Peterburgo – Leningrado – Peterburgo dum cent jaroj, 1917–2017. La kvina libro, **La plej malbona malamiko de Putin**, estis publikigita en 2021

kaj temas pri la malliberigita opozicia politikisto Alexei Navalny, kiun la rusa sekureca servo provis veneni. Mi ofte kaj feliĉe parolas pri miaj libroj antaŭ publiko. Mia firmao tiam fakturas laŭ la minimumaj rekomendoj de la Sveda Verkista Unio. Mi ankaŭ havas blogon, Glasnost.se, kie mi plejparte skribas pri evoluoj en Rusio kaj Ukrainio.

Mi naskiĝis en 1965 en Joensuu, Nord-Kareljo kaj loĝas en Lund ekde 1987, kvankam kun pluraj gastadoj diversdaŭraj en Finnlando kaj Rusio, en ĉi-lasto lando kiel lingvostudento en Leningrado en 1989 kaj kiel Moskva korespondanto por la gazeto Kansan Uutiset 1991–1992.

Mia edzino Maria laboras kiel bibliotekisto en la urba biblioteko en Malmö.

Strofo el **Preĝo sub la verda standardo** de L.L. Zamenhof:

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
Sed ĝi sin dividis batale;  
Popolo popolon atakas kruele,  
Frat' fraton atakas ŝakale.  
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
Aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera,  
Redonu la pacon al la infanaro  
De l'granda homaro!



# La politikisto Rickard Nordin, intervjuita de Ingegerd Granat



La politikisto Rickard Nordin meze en la politiko kune kun Ingegerd Granat en la arda seĝo.

I "Heta Stolen", mitt i politiken, med riksdagsmannen Rickard Nordin.

*Ingegerd en la arda seĝo de Pehr Dubb en la preĝejo en Angered.*



## 1. Kiu vi estas Rickard?

Mi estas Smolandano, kiu alvenis en Gotenburgo, kaj pro granda intereso pri la medio kaj granda parto de veturado, mi alvenis en la Parlamento kun respondeco pri klimataj kaj energiaj aferoj.

Unu el la plej amuzaj kaj ankaŭ la plej gravaj temoj, kiuj ekzistas.

## 2. Kiel vi sentis vin kiam, kiel juna viro en la mezo de la reala vivo, vi ricevis ĉi tiun grandan parlamentan taskon?

Estis kapturna. Mi venis kiel anstataŭanto preskaŭ subite. Je 17.45 vendrede vespere, oni diris al mi, ke mi estu en Stokholmo lunde.

Mi intencis forlasi politikon, sed ĝi estis ŝanco, kiu estis multe tro ekscita por malakcepti.

## 3. Vi ĉiam havis grandan engaĝiĝon al la medio, ĉu vi povas rakonti al ni kiel vi alvenis al la supro de ventoturbino?

Mi ĉiam trovis amuze provi novajn aferojn kaj mi estas pelata de scivolemo. Kiam ni iris por studvizito, kaj mi, kaj nia komunika fako kaj tiuj, kiujn mi estis vizitotaj, elpensis la ideon, sendepende unuj de la aliaj, ke mi supreniru ventoturbinon. Estis tiel sukcesa, ke la bildo prenita de la supro estis eĉ ekspoziciita ĉe Fotografiska (fotografia muzeo) en Stokholmo!

## 1. Vem är du Rickard?

Jag är en smålänning som hamnat i Göteborg och genom ett stort miljöintresse och en rejäl portion driv så hamnade jag till slut i riksdagen med ansvar för klimat- och energifrågor.

Något av det roligaste och även viktigaste som finns.

## 2. Hur kändes det, när du som ung man mitt i det verkliga livet, fick detta stora riksdagsuppdrag?

Det var omtumlande. Jag kom in som ersättare nästan över en natt. Kl 17.45 en fredagskväll fick jag veta att jag skulle inställa mig i Stockholm på måndagen.

Jag hade tänkt lämna politiken, men det var en chans som var alldeles för spännande för att tacka nej.

## 3. Du har ju alltid haft stort engagemang för miljön, kan du berätta hur du hamnade högst upp på ett vindkraftverk?

Jag har alltid tyckt det är roligt att testa nya saker och jag drivs av nyfikenhet. När vi skulle ut på studiebesök som kom både jag, vår kommunikationsavdelning och de jag skulle hälsa på med idén, oberoende av varandra att jag borde upp i ett vindkraft-verk. Det blev så lyckat att bilden som är tagen från toppen till och med ställts ut på Fotografiska i Stockholm!



#### 4. Kiel aspektas ordinara tago por vi en la Parlamento?

Preskaŭ ne ekzistas ordinara tago, ĉiuj estas malsamaj. Tamen multe temas pri aŭskultado. Mi renkontas multajn homojn, de privataj individuoj kaj ekologiaj organizoj ĝis kompanioj kun vendosumo de miliardoj. Surbaze de tio, esplorado kaj multe pli, mi tiam povas formi opinion kaj krei politikon por la profito de la tuta Svedio.

#### 4. En vanlig dag i riksdagen, hur ser den ut för dig?

Det finns nästan ingen vanlig dag, alla är olika. Mycket handlar dock om att lyssna. Jag träffar många, alltifrån privatpersoner och miljöorganisationer till bolag med miljardomsättning. Utifrån det, forskning och mycket annat så kan jag sedan bilda mig en uppfattning och skapa politik för hela Sveriges bästa.



#### 5. Vi ja kutime partoprenas en ia Vasa-skikonkurso. Ĉi-jare ĝi estis iom speciala, kio okazis?

Jes vere! Mi ricevis la ŝancon partopreni en tio, kio estis nomata la Jubilea Vasa-konkurso, kie ni uzis centjaran ekipaĵon kiel omaĝon al la unua Vasa-konkurso en 1922. Estis mirinda sperto, kiu bedaŭrinde finiĝis duonvoje por mi kiam mia ekipaĵo efektive disfalis.

#### 6. Kiu estas via plej bona rezulto en la menciita skikonkurso?

Mi ja ankaŭ partoprenas en la ordinara Vasa-konkurso kaj en la ĉi-jara konkurso mi venkis mian personan rekordon finante post iom pli

#### 5. Du brukar ju åka någon form av Vasalopp, i år var det visst lite speciellt, vad hände?

Ja verkligen! Jag fick chansen att delta i det som kallades Jubileumsvasan där vi använde hundra år gammal utrustning som en hyllning till det allra första Vasaloppet 1922. Det var en underbar upplevelse, som tyvärr tog slut halvvägs för mig när min utrustning bokstavligt talat föll i bitar.

#### 6. Vilken är din bästa tid i nämnda lopp?

Jag åker ju även ordinarie Vasalopp och i årets upplaga slog jag personbästa med en tid på lite drygt 7 timmar. Det var onekligen speciellt att ställa om från tunga, långa träskidor med

ol 7 horoj. Estis nekontesteble aparta sperto ŝanĝi de pezaj, longaj, lignaj skioj kun bambuaj bastonoj al rapidaj kaj malpezaj skioj, kiuj glitis multe pli bone.

### **7. Vi estas el Smolando, kaj Smolandanoj onidire estas laboremaj kaj avaraj. Kiel ĉi tio konvenas al vi?**

Verŝajne pli bone ol mi volas konfesi. Paĉjo instruis al mi, ke tio, kion oni faras, estu farita je 100 %. Tio estas io, kion mi kunportis kaj aplikas ne laste ĉe la laboro.

Mi ankaŭ emas pensi, ke mi ne estas tiel avara, sed ŝparema, kaj pri mia propra mono kaj pri la mono de la impostpagantoj.

Tio ankaŭ donas la avantaĝon, ke mi, kune kun mia patrino, povis aĉeti kaj renovigi somerdometon tuj apud la lago, kie mi elkreskis.

### **8. Kian aŭtomobilon vi havas, kaj kiel vi rigardas veturadon? Kiom kostu la brulaĵo? Kie estas la dolorlimo?**

Mi veturas VW Golf kiu funkcias per biogaso. Estas facile fiksi la atenton nur al elektraĵaŭtoj, kiuj estas mirindaj, sed biogaso aŭ renovigebla dizelo ankaŭ estas bonegaj alternativoj. Precipe por ni, kiuj loĝas en apartamentoj en urboj kaj ne havas aliron al ŝargado hejme.

Multaj homoj ne havas alternativon al la aŭtomobilo kaj estas kompreneble por mi, ke estu eble vivi kaj labori ĉirkaŭ la tuta lando. La prezoj, kiujn ni nun vidas, estas tute senraciaj kaj estas altigitaj de la milito en Ukrainio. Tiam ankaŭ estas logike, ke ankaŭ politiko eniras kaj helpas, samtempe ke ni multe investas por sendependiĝi kaj mem produkti pli.

Ĉi tio estas unu el la grandaj avantaĝoj de la socia ŝanĝo por savi la klimaton. Ni povas uzi svedajn krudaĵojn, kiuj nek difektas la klimaton nek apogas totalismajn ŝtatojn. Tiel ni ankaŭ evitos la prezaltiĝojn kiam la monda merkato de petrolo ekaltiĝas.

### **9. Ĉu vi kapablas kuiri, kaj kion vi opinias pri la ŝanco de Svedio produkti bonajn ingrediencojn?**

bambustavar till snabba och lätta skidor som gled betydligt bättre.

### **7. Du är ju smålänning och en smålänning är ju strävsam och snål enligt talesättet, hur stämmer detta in på dig?**

Antagligen bättre än jag vill erkänna. Pappa lärde mig att det en gör, ska göras till 100%. Det är något jag tagit med mig och tillämpar inte minst på jobbet.

Jag brukar också tänka att jag inte är så snål, men sparsam, både när det gäller den egna ekonomin och skattebetalarnas pengar.

Det ger också fördelen att jag, tillsammans med mamma kunnat köpa och reovera en sommarstuga precis vid sjön där jag är uppväxt.

### **8. Vad har du för bil, och hur ser du på bilåkandet, hur mycket skall bränslet kosta, var ligger smärtgränsen?**

Jag kör en VW Golf som går på biogas. Det är lätt att stirra sig blind på elbilar, som ju är fantastiska, men biogas eller förnybar diesel är också utmärkta alternativ. Speciellt för oss som bor i lägenhet i städer och inte har tillgång till laddning hemma.

Många har inget alternativ till bilen och det är en självklarhet för mig att det ska kunna gå att leva och bo runt om i hela landet. De priser vi nu ser är helt orimliga och drivs ju upp av kriget i Ukraina. Då är det också logiskt att politiken också går in och hjälper till, samtidigt som vi storsatsar på att bli mer oberoende och tillverkar mer själva.

Det är en av de stora fördelarna med klimatomställningen. Vi kan använda svenska råvaror som vare sig skadar klimatet eller gynnar totalitära stater. Då slipper vi också prisökningarna när världsmarknaden på olja skenar.

### **9. Är du duktig på att laga mat och hur ser du på Sveriges möjlighet att producera bra råvaror?**

Jag lagar rätt mycket husmanskost, men min stora talang är bakning. Jag och sonen brukar

Mi kuiras sufiĉe da ĉiutaga manĝaĵo, sed mia granda talento estas bakado. Ĉiujare, mi kaj mia filo kutime bakas preskaŭ cent fastobulkojn en diversaj gustoj, per kiuj ni poste regalas ĉiujn niajn amikojn ĉe granda festo.

Sveda agrikulturo estas mirinda. Estas klimat-inteligenta kaj bruta bonfarto estas mondklasa. Tio estas io, kion ni devus kuraĝigi, kaj donante decajn kondiĉojn al tiuj, kiuj produktas nian manĝaĵon, kaj ion, kion mi esperas, ke pli da konsumantoj komprenas kaj elektas svedajn produktojn.

### **10. Kio estas sur via telero kiam vi sentas vin vere feliĉa?**

Freŝbakita sandviĉo kun memfarita rabarba marmelado. Tio, kune kun glaso da malvarma lakto, estas malfacile venki.

### **11. Kiel vi vidas la socian situacion hodiaŭ? Multe ŝanĝiĝis, ĉu ne?**

Mi estas maltrankvila. Politiko fariĝas ĉiam pli miopa kaj aŭtoritataj fortoj pli kaj pli gajnas. Estas facile preni demokration kiel certa, sed la signoj en nia mondo ne estas brilaj kaj ni ĉiuj bezonas helpi unu la alian por plifortigi kaj demokration kaj evoluon. Mi ŝatus ke pli da homoj okupiĝu pri politiko – sendepende de partio. Tio estus forto por Svedio.

### **12. Ĉu estas tute neeble enmeti la lingvon Esperanto, "ĉies lingvo", sur la horaron ekde la mezlerneja nivelo, por egale plibonigi komunikadon?**

Mi pensas, ke estas malfacile fari ĝin deviga temo. Aliflanke, estus valore, se pli da homoj havus la ŝancon elekti ĝin en sia lingvoelekto. Esperanto estas vere demokratia projekto kaj sukcesa historio en si mem, atinginte tiom da homoj!

### **13. Kion vi opinias pri Stokholmo kompare kun Gotenburgo? Kio estas la diferenco inter la du urboj, kaj kiu el ili estas plej bona pri publika transporto?**

La metroo (en Stokholmo) eble estas pli rapida, sed la tramoj (en Gotenburgo) estas klare pli komfortaj. Ĝi ankaŭ resumas mian senton, ke Stokholmo estas la plej malgranda

varje år baka närmare ett hundratal semlor i en mängd olika smaker som vi sedan bjuder på till en stor fest för alla våra vänner!

Det svenska lantbruket är fantastiskt. Den är klimatsmart och djurvälferden är i världsklass. Det är ju något vi ska uppmuntra, både genom att ge schyssta villkor till de som producerar vår mat och något jag hoppas fler konsumenterna inser och väljer svenskt.

### **10. Vad ligger på din tallrik när du känner dig riktigt nöjd?**

En nygräddad fralla med hemmagjord rabarbermarmelad. Det, tillsammans med ett glas kall mjölk är svårslaget.

### **11. Hur ser du på samhällssituationen idag, mycket har ju förändrats?**

Jag är bekymrad. Politiken blir allt mer kortsiktig och auktoritära krafter får allt mer utrymme. Det är lätt att ta demokratin för given, men tecknen i vår omvärld är inte ljusa och vi behöver alla hjälpas åt för att stärka både demokratin och utvecklingen. Jag vill gärna att fler engagerar sig politiskt – oavsett parti. Det skulle vara en styrka för Sverige.

### **12. Är det helt omöjligt att få språket Esperanto, "allas språk", på schemat från högstadienivån, för att förbättra kommunikationen på ett jämlikt sätt?**

Jag tror att det är svårt att göra det till ett obligatoriskt ämne. Däremot hade det ju varit värdefullt om fler fick möjlighet att välja det i sitt språkval. Esperanton är verkligen ett demokratiprojekt och en framgångssaga i sig att det nått så många!

### **13. Vad tycker du om Stockholm jämfört med Göteborg, vad är det som skiljer de båda städerna och vilken av dem är bäst på kollektivtrafik?**

Tunnelbanan må vara snabbare, men spårvagnarna är ju klart mysigare. Det sammanfattar också min känsla att Stockholm är världens minsta storstad, medans Göteborg är världens största småstad. Jag trivs bättre här i ett lite mindre sammanhang, men så är

grandurbo de la mondo, dum Gotenburgo estas la plej granda urbeto de la mondo. Mi sentas min pli bone ĉi tie en iomete pli malgranda kunteksto, sed mi ja estas de vilaĝo en Smolando kaj amas la engaĝiĝon de la civila socio.

**14. Ĉu estas bona etoso kaj "bona tono" en la Parlamento inter la kunsidoj? Ĉu ĉiuj tiam parolas inter si en normala maniero, malgraŭ malsamaj politikaj opinioj?**

Absolute! Estas ofta miskompreno, ke ni estas koleraj unu kontraŭ la alia. Ni ĉiuj estas ĉi tie ĉar ni estas pelataj plibonigi aferojn. Tamen ni havas iomete malsamajn manierojn atingi tien.

Evidente estas malfacilaj debatoj, kaj tiel devas esti, sed intertempe ni multe amuziĝas kune. Komence de aprilo, ekzemple, kaj membroj kaj oficistoj el ĉiuj partioj, inkluzive de nepolitikistoj, iros al Norvegio por venki niajn najbarajn landojn en la Nordiaj Parlamentaj Ĉampionecoj pri skikurado. Tio estas kutime granda prestiĝo kun multe da ridoj.

**15. Ĉu vi iam havis kialon por ridi en la plensalono? Ĉu io alia aparte amuza okazis ĉe "laboro"? Rakontu!**

Ofte! Povas esti ĉio ekde erardiro ĝis kiam kolego ekkantis sur la podio. La plej bona afero ankoraŭ estas la komuneco kaj kiom mi povas lerni. Do, kompreneble, estas mojose partopreni kaj ŝanĝi aferojn.

Mi okupiĝis kune kun aliaj por meti la plej durajn klimatajn celojn de la mondo, mi kreis proponojn pri kiel ni povas akiri pli da sunĉeloj kaj tio nun estas realaĵo, kaj mi negocis la ŝtatbuĝeton kun Magdalena Andersson. Ĉi tio vere estas io por rakonti al la genepoj.

/Ingegerd

jag ju också från en by i Småland och älskar civilsamhällets engagemang.

**14. Är det en god stämning och en "god ton" i Riksdagen mellan sittningarna? Pratar alla med varandra då på ett normalt sätt, trots olika politiska uppfattningar?**

Absolut! Det är en vanlig missuppfattning att vi går omkring och är sura på varandra. Vi är ju alla här för att vi drivs av att göra saker bättre. Sen har vi lite olika vägar dit.

Det är självklart tuffa debatter och ska så vara, men däremellan har vi mycket roligt ihop. I början av april åker exempelvis både ledamöter och tjänstepersoner från alla läger, även opolitiska till Norge för att spöa våra grannländer i Nordiska parlamentsmästerskapen i längdskidor. Det brukar vara stor prestige och många skratt!

**15. Har du haft anledning att skratta någon gång i plensalen? Har det hänt något annat särdeles roligt på "jobbet"? Berätta!**

Många gånger! Det kan vara allt ifrån en rolig felsägning till när en kollega brast ut i sång i talarstolen. Det allra bästa är ändå gemenskapen och hur mycket jag får lära mig. Sen är det såklart häftigt att få vara med och förändra.

Jag har fått vara med och sätta världens tuffaste klimatmål, skapat förslag för hur vi ska få mer solceller som nu är verklighet och förhandlat statsbudget med Magdalena Andersson. Det är verkligen något att berätta för barnbarnen.

/Ingegerd

## Humuro el la jaro 1904

TIO ŜANĜIS LA AFERON. – La mastrino: "La lupago de la ĉambro estas ĉi tiel malalta, ĉar supre loĝas maljuna fraŭlino, kiu tuttage ludas pianon."

La sinjoro: "Ne gravas, ĉar mia nevino, al kiu mi volas luigi ĝin, estas malbonaŭda."

La mastrino: "Nu – tiam ĝi kompreneble kostas monate 5 kronojn pli!"

# Malofta vizito al Smögen

Monica recenzas ĉi tiun novaĵon de Göteborgs-Posten, sabate la 19an de marto.



Artikolo en Göteborgs-Posten temas pri rosmaro, kiu kuŝiĝis por ensuĉi sunbrilon sur ponto en Smögen. Ĝi kaŭzis grandan intereson de la loĝantoj en Smögen.

Docento pri submara biologio ĉe la Naturhistoria Muzeo de Gotenburgo, Kennet Lundin, diras: – Ĉi tio estas treege neordinare.

La rosmaro estis vidata en Smögen jam ĵaŭde kaj kaj vendrede okazis tumulto. Kennet Lundin informas: – Supozeble estas la marfluo, kiuj fine movis ĝin al Smögen. La rosmaroj ofte troviĝas en nordaj latitudoj, kiel Svalbard kaj orienta Gronlando.

La rosmaroj parencas al la foko, kiuj estas pli konataj al ni en la okcidenta marbordo, sed la rosmaroj estas karakterizataj per siaj lipharoj, uzataj por trovi nutraĵon sur la fundo de la maro, laŭ la Speciodatenbanko ĉe SLU.

Oni ne scias ĉu estas ino aŭ virbesto. En plenkreska aĝo rosmaro povas pezi ĝis 900 kilogramoj kaj povas esti iomete pli ol tri

metroj. Ĝi verŝajne estis iom laca kaj kuŝas kaj satripozas. Tion oni devas respekti kaj teni distancon, Kennet Lundin opinias.

En dua artikolo de Göteborgs-Posten, unu semajnon pli malfrue, oni eksciis pli da informoj pri la rosmaro. En "La Domo de la Maro" en Lysekil oni suspektis ke temas pri la fama rosmaro Freya, kiu gastis kaj ĉe britaj insuloj kaj apud nederlandaj submaraj ŝipoj.

Montriĝis ke ĝi estas infektita. Scivolemaj personoj devis teni distancon.

Freya estis videbla en Nederlando kaj en Danio. Komuna karakterizaĵo kun la Smögen-rosmaro kaj Freya estas blanka punkto proksime al la nazo kaj difektoj sur unu el la naĝiloj.

Freya ekvidiĝis en Britio je la fino de 2021, diversloke sur la britaj insuloj.

Okazis pli frue ke rosmaroj faris eŭropajn rondvojaĝojn.

/ Monica

# La granda kuiristo en Svedio, Leif Mannerström

de Ingegerd

Leif Mannerström estas unu el la plej elstaraj kuiristoj de Svedio. Li estis nomita "Kuiristo de la Kuiristoj" tri fojojn kaj estis la stelo de Guide Michelin dum pli ol dek jaroj.


En la libro "La kuira vivo" de Leif Mannerström ni sekvas lian longan, sensacian vivon kaj karieron en personaj rakontoj por la aŭtoro kaj gastiganto Jesper Aspegren.

Kun avino kiu estis festokuiristino kaj patro kiu estis kuiristo, Leif Mannerström kreskis en medio kie manĝaĵo kaj kuirado estis centraj. Jam 15-jara li eklaboris en la kuirejo kaj ekde tiam la manĝo kaj restoracia vivo formis lian vivon en sennombraj kuirlibroj, vojaĝoj kaj renkontiĝoj kun homoj.

Temas pri la knabo, kiu taŭgis por nenio, pri supreniroj kaj malbonoj, malbonaj germanaj kuiristoj, Cister Svantesson, la vojaĝoj al Francio, Tore Wretman, la pladoj, kiujn vi memoras kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas kuiritaj, Sjömagasinet, Bono, Mick Jagger, la televidprogramoj kaj multe pli ...

Sed temas ankaŭ pri la batalo por pli bona manĝaĵo en niaj malsanulejoj kaj maljunulejoj, kie Mannerström tondras kontraŭ nezorgemo, malbonaj krudaĵoj kaj malbona kuirado.

Pasio kaj sindonemo al la rakontoj, la manĝaĵo kaj la restoracia vivo karakterizas ĉi tiun tutan bonan rakonton. La libro estas riĉe



ilustrita kaj kompreneble enhavas ankaŭ recepton.

La libro el 2008 nomiĝas "La kuira vivo de Leif Mannerström".

Ni rekomendas ankaŭ la kuirlibron "Majstraj menuoj" el 2014.

Li estas amuza, tiu Mannerström!

Li havas belan kuirejon en la interreto nomita "Mannerström", kie li kuiras kun sia franca amiko kaj metilernanto, Petrus. Eniru kaj rigardu, ĝi estas bonega distro!

Ne forgesu la rolo kiel juĝisto en la populara sveda televida programo "La majstra kuiristo" dum multaj jaroj!

## Rimedo en la jaro 1880 se mankis importitaj komercaĵoj

### Falsaj olivoj

De malgrandaj, rondaj, nematuraj prunoj oni fortondas la tigojn proksime, poste oni metas ilin en fortan peklakvon dum tri tagnoktoj. Poste oni sternas ilin inter toloj por sekiĝi, post kiam oni varmigas ilin en vinagro, sen boligi ilin.

Verŝu ilin en bokalon aŭ glazuritan ŝtonkrucon por malvarmiĝi. Oni nodu vakspaperon kiel kovrilon sur la ujo aŭ pli volonte urinan vezikon de bovo. Oni poste povas uzi ilin anstataŭ eksterlandaj olivoj.

El la kuirlibro "Nylanders kokbok".

# *El la gazeto FOLKBLADET*

## Artikolo de Språkförsvaret (La lingvodefendo)



Foto: TT

*Ĉi tie ni vidas Sandra Näslund festi sian olimpikan oron pli frue ĉi-jare. En tiuj kuntekstoĵ, Svedio kaj la sveda estas gravaj. Sed kiel estas alie? La Lingva Defendo volas respondojn de ĉiuj partioj en la parlamenta balotado.*

*Här ser vi Sandra Näslund fira sitt OS-guld tidigare i år. I de sammanhangen är Sverige och svenskan viktiga. Men hur är det annars? Språkförsvaret vill ha svar från alla partier i riksdagsvalet.*

### **Demandoj al la politikaj partioj antaŭ la balotkampanjo de 2022**

#### **La statuso kaj la uzebleco de la Lingva Leĝo**

1. Unuanima Parlamento adoptis lingvan leĝon en 2009 kiu reguligas la pozicion de la sveda lingvo. Kiel via partio rigardas la lingvan leĝon? Ĉu la lingva leĝo plenumis la atendojn? Aŭ ĉu la lingva leĝo estu pliseverigita?

#### **La pozicio de la svedo en lernejo**

2. Kiom da spaco laŭ via partio la sveda edukado devus havi en la bazlernejo kaj en la gimnazio, ekzemple en procento aŭ en nombro da horoj, por ke ĝi estu konforma al la lingva leĝo en Svedio?

3. Kiel via partio rigardas la fakton, ke imposto-financitaj lernejoj instruas en fremda lingvo (legu: la angla) ĝis 50 procentoj de la tempo en deviga lernejo kaj en ĉiuj

### **Frågor till de politiska partierna inför valrörelsen 2022**

#### **Språklagens ställning och användbarhet**

1. En enhällig riksdag antog 2009 en språklag, som reglerar svenska språkets ställning. Hur ser ert parti på språklagen? Har språklagen motsvarat förväntningarna? Eller bör språklagen skärpas?

#### **Svenskans ställning i skolan**

2. Hur stor plats anser ert parti att svenskundervisningen bör få i grundskolan och gymnasieskolan, exempelvis procentuellt eller i antal timmar, så att det stämmer överens med Sveriges språklag?

3. Hur ser ert parti på att skattefinansierade skolor undervisar på ett främmande språk (läs: engelska) i upp till 50 procent av tiden i

### **fakoj krom la sveda lernofako en supera mezlernejo?**

4. Laŭ via partio, kiel la instruado de la sveda al enmigrintoj estu organizita en la eble plej efika maniero?
5. Kion opinias via partio pri la postulo de baza scio de la sveda por akiri svedan civitanecon

### **La sveda kiel kompleta, socia lingvo**

6. Ĉu via partio konsideras grava, ke la sveda pluvivu kiel kompleta, scienca lingvo? Ĉu via partio konsideras la pozicion de la svedo en supera edukado kaj esplorado kontentiga? Se ne, kion oni faru pri ĝi?
7. Ĉu via partio konsideras, ke estas minaco al la sveda kiel socia lingvo kaj ke estas perdoj en specialaj partoj al la angla, precipe ene de la universitato kaj la komerca mondo?

### **grundskolan och i samtliga ämnen utom svenskämnet i gymnasiet?**

4. Hur bör undervisningen i svenska för invandrare enligt ert parti organiseras på effektivast möjliga sätt?
5. Vad anser ert parti om kravet på grundläggande kunskaper i svenska för att kunna få svenskt medborgarskap?

### **Svenskan som komplett, samhällsbärande språk**

6. Anser ert parti att det är viktigt att svenskan överlever som ett fullödigt, vetenskapligt språk? Anser ert parti att svenskans ställning inom högre utbildning och forskning är tillfredsställande? Om inte vad bör göras åt saken?
7. Anser ert parti att det föreligger ett hot mot svenskan som samhällsbärande språk och att det sker domänförluster till engelskan, särskilt inom högskolan och affärsvärlden?



### **La stato de la sveda en EU**

8. Ĉu via partio konsideras la pozicion de la sveda en EU kontentiga? Se ne, kiel la situacio devus esti plibonigita? Ĉu via partio kredas, ke svedaj registaraj reprezentantoj kaj EU-parlamentanoj sufiĉe uzas la svedan en ĉiuj EU-kunteksto, kie eblas?
9. Ĉiam malpli da svedaj lernejoj hodiaŭ studas ĉefajn EU-lingvojn kiel la germanan kaj la francan. Ĉu tio influas estontece la pozicion de Svedio en EU? Se jes, kiaj kontraŭrimedoj estas bezonataj en tiu kazo?

### **Svenskans ställning i EU**

8. Anser ert parti att svenskans ställning i EU är tillfredsställande? Om inte, hur bör läget förbättras? Anser ert parti att svenska regeringsföreträdare och EU-parlamentariker i tillräcklig utsträckning använder svenska i alla EU-sammanhang där det är möjligt?
9. Allt färre svenska skolelever studerar idag stora EU-språk som tyska och franska. Påverkar detta Sveriges ställning i EU på sikt? Om ja, vilka motåtgärder krävs i så fall?
10. Vad är er inställning till att svenska inte längre alltid används vid kontakter med andra nordiska länder i offentliga sammanhang?



10. Kia estas via sinteno pri tio, ke la sveda ne plu estas ĉiam uzata en kontaktoj kun aliaj nordiaj landoj en publikaj kunteksto?

### **La sveda en la amaskomunikilaro**

11. Hodiaŭ, la komerca televidoferto en Svedio precipe estas dominata de anglalingvaj filmoj kaj serioj. Ĉu via partio konsideras ĉi tiun situacion kontentiga? Se ne, ĉu estus eble ripaĝri ĝin?

12: Kiel via partio rigardas la taskon havi specialan respondecon por la sveda lingvo en publika servo? Ĉu konkretaj reguloj estas bezonataj?

### **La sveda en publikaj kunteksto**

13. Iuj publikaj institucioj, kampanjoj, projektoj, konstruaĵoj kiel Stockholm Waterfront, Mall of Scandinavia, la finaĵo Airport anstataŭ flughaveno, kaj multaj pli hodiaŭ havas nur anglajn nomojn. Ĉu via partio konsideras grava se tiuj estas nomitaj en la sveda aŭ la angla? Kiu nomprincipo devus esti aplikata?

14. La Lingva Leĝo ampleksas nur la kernajn agadojn de la socio, la ŝtato, do de la aŭtoritatoj. Kiel via partio rigardas kompaniojn eldonantajn reklamojn aŭ varmarkojn nur en la angla? Kiajn efikojn tio havas sur la pozicio de la sveda lingvo? Ĉu estas dezirinde procesigi tian reklamadon?

### **La pozicio de la svedo en via partio**

15. Kion opinias via partio pri la sveda pozicio estontece en Svedio?

16. Kial via partio ne havas elektitan parolanton pri lingvopolitiko? Nek ekzistas esprimita lingvopolitiko, kiu estas ligita al la pozicio de la sveda lingvo kaj la aplikado de la Lingva Leĝo?

Ĉu la lingva afero estas tro negrava por la partio?

\*\*\* *La respondoj estas sendataj – prefere antaŭ la 30-a de majo 2022 – al [sprakforsvaret@yahoo.se](mailto:sprakforsvaret@yahoo.se) aŭ poŝte al Språkförsvaret, Spånga kyrkväg 616, 16362 Spånga*

**La lingva defendo**

## **Svenskan i media**

11. I dag domineras i synnerhet det kommersiella tv-utbudet i Sverige av engelskspråkiga filmer och serier. Anser ert parti att denna situation är tillfredsställande? Om inte, bör den åtgärdas på något sätt?

12. Hur ser ert parti på public service uppgift att ha ett särskilt ansvar för svenska språket? Behövs konkreta regler?

### **Svenskan i offentliga sammanhang**

13. Vissa offentliga institutioner, kampanjer, projekt, byggnader som Stockholm Waterfront, Mall of Scandinavia, efterleden Airport i stället för flygplats, och många fler har idag enbart engelska namn. Anser ert parti att det har betydelse om dessa namnges på svenska eller engelska? Vilken princip för namngivningsprincip bör tillämpas?

14. Språklagen omfattar endast det allmänna, det vill säga myndigheternas, kärnverksamhet. Hur ser ert parti på att företag publicerar reklam eller varumärken enbart på engelska? Vilka effekter har detta på svenska språkets ställning? Är det önskvärt att beivra detta slags reklam?

### **Svenskans ställning i ert parti**

15. Vad har ert parti för tanke om svenskans ställning på lång sikt i Sverige?

16. Varför har Ert parti ingen utpekad språkpolitisk talesperson? Inte heller någon uttryckt språkpolicy, som är kopplad till svenska språkets ställning och tillämpningen av språklagen?

Är språkfrågan för oviktig för partiet?

\*\*\* *Svaren skickas – helst före 30 maj 2022 – till [sprakforsvaret@yahoo.se](mailto:sprakforsvaret@yahoo.se) eller via post till Språkförsvaret, Spånga kyrkväg 616, 16362 Spånga*

**Språkförsvaret**

# El Sat.iroj, finvenka revuo pri ŝercoj, Aŭstrio

Por Sat.iroj oni urĝe serĉas kontribuantojn. Bonvole skribu al la eldonejo: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at). Danko eterna garantiotas.

## Ŝercoj de Alfred Heiligenbrunner

1) "Ĉu ankaŭ via patro postulas, ke vi preĝu antaŭ manĝado?" "Ne, mia patrino sufiĉe bone kuiras."



2) Unu ĉasisto al sia amiko: "Mi havas strangan hundon. Ĉiam, kiam mi pafas kaj maltrafas, la hundo ĵetas sin sur tero, metas la piedojn supren kaj ridegas."

"Kaj kion li faras, kiam vi trafas?"

"Tion mi ne scias. Mi havas ĝin nur ekde tri jaroj."

3) "Saluton, Hugo, imagu nur, baldaŭ mi iĝos patro!" "Kaj kial vi tiom triste rigardas?" "Nu jes, mi ankoraŭ devos rakonti tion al mia edzino."



NEŜERCO: **Se vi amas Esperanton, ne starigu monumenton!**

*Bildo: La duono de la mondo. La bildoj venas de Pixabay.*

## Finns det skalbaggas i Skara?

Det roar mig att se vad olika ord blir översatt till esperanto och många andra språk. Ta skalbagge som ett exempel. På esperanto blir det **skarabo**. För mig, som kommer från Falköping blir det rätt roligt.

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Skarabo>

**engelska** – "sacred scarab beetle" (inte Beatles!)

**latin, spanska, italienska** – Scarabaeus

**litauiska** – Plokštėtaūsi

**norska** – Arten Scarabaeus sacer er kjent som den hellige skarabé

**ryska, ukrainska** – Скарабей

**polska** – Skarabeusz

**tjeckiska** – Vrúboun

Så kan vi gå vidare till **nyckelpigan**.

På svenska är det ett feminint namn – det finns nyckelpigehannar!

**afrikaans** (Sydafrika) – Lieveheersbestje

**baskiska** – Marigorringo

**bulgariska** – kalinka, калинка

**tyska** – Marienkäfer (femininum)

**danska** – Mariehøns

**isländska** – Maríuhænur

**engelska** – Ladybug



**finska** – Leppäkerttu  
**estniska** – Lepatriinulased  
**ungerska** – Katicabogárfélék  
**turkiska** – Uğur böceği  
**kurdiska** – kêzhatûn  
**tjeckiska** – Slunéčkovití  
**slovakiska** – Lienka  
**slovenska** – Pikapolonica  
**ryska** – Бóжьи корóвки  
**ukrainska** – Сóнечка  
**kroatiska, makedonska** – Bubamara/e  
**Luxemburg** – Himmelsdéiercher  
**albanska** – Mollëkuqja  
**indonesiska** – Kumbang koksi

**katalan** – Marieta  
**nordfriisiska** – Goodshenken  
**plattdeutsch** – Sünnenküken  
**polska** – Biedronkowate  
**rumänska** – gărgăriță  
**koreanska** – mudangbeolle 무당벌레  
på **Madagaskar** – kamboty  
**maori** – kutukutu  
**swahili** – Mdudu-kibibi  
**tagalog** – Uwang babae/kulisap  
**tadjikiska** – хонум  
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kokcinelo>  
/Inga Johansson

## La distanca Ture Sventon

De Carl-Olof Selenius

Oni povas alproksimiĝi literaturon dumaniere: Aŭ oni volas sperti ion novan, aŭ oni volas enprofundiĝi en ion jam konatan.

Ekzemple: Pri la Nobel-premio pri literaturo de 2021 neniuj kriis "Post loonge" (Ääntligen!), kiel ili fojfoje faras, ĉar preskaŭ neniuj konis la gajninton Abdulrazak Gurnah. Eldonistoj ĝojis, ke en nia hodiaŭa introverta, narcisisma tempo aperis voĉo de Zanzibar, sed ili bedaŭris, ke sen Nobel-premio ili ne povus eldoni tian interesan literaturon. La merkato nur malofte permesas tion. Ĝi postulas konatecon, eĉ se la idealo estas prezenti ion novan.

Ekzakte por kontraŭi tian spiritan malvastecon Esperanto estiĝis. Per Esperanto oni povas atingi la ne-konatan.

Tamen ankaŭ la bone konata ludas rolon por ni esperantistoj. Ora ĵurnalo estas ekzemplo pri tio. En ĝia enhavo la svedlingvaj legantoj

trovas multajn konatajn aferojn, kaj tio faras la legadon eĉ pli interesa.

Jen alia ekzemplo, tiu el mia vivo: Kiam mi lernis Esperanton mi komence legis la libron La fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren. Ĉar mi jam antaŭe legis tiun libron svede, mi povis kompreni kaj ĝui ĝin, kvankam mi ankoraŭ ne komprenis ĉiun vorton. Efika estas tiu lerno-metodo: legi libron kiun oni jam konas. Alia libro, kiun mi ŝatis pro mia kono pri ĝi, estis Ture Sventon en Londono de Åke Holmberg, tradukita de Malte Markheden. Tiun libron mi legis kun alia esperantisto, Louise Agnesdotter.



**Tiam Louise vigle kaj brave proponis ke ni kune traduku Ture Sventon i öknen, ŝia favorita Ture Sventon-libron. Per tio ni esperis plibonigi nian lingvonivelon. Kaj ni vere sukcesis.**



Dufoje ĉiun jaron ni renkontiĝis – dum la covim-periodo per telefono. Nun nia Esperanto-kapablo estas tiel alta, ke ni povas utili nian lingvon por transiri limojn ĝis kulturoj, kies lingvojn ni ne scias. Ni do povas serĉi la novan, la ne-konatan. Sed ankoraŭ plaĉas min ankaŭ la tre konata. Mi ŝatas la pendolan movon inter la konata kaj la aventura.

Ankaŭ en nia traduklaboro, en la penado prezenti Ture Sventon al la Esperanto-publiko, enestas tia pendola movado. Por mi estas bone konata la tempo, kion la libro prezentas, kaj mia kuntradukistino Louise trovas en la libro karan kaj hejmecan senton, ĉar ŝi legis ĝin multfoje ekde siaj fruaj infanjaroj. Sed por nuntempa sveda infano

*Komento: Ankaŭ mi legis "La fratoj Leonkoro" en esperantokurso. Mia instruisto tiam estis Bo Sandelin. Mi ja ŝatis la libron kaj sentis ke vere indas lerni esperanton legante ion interesan. Eĉ se la enhavo samas en la sveda kaj esperanta versioj, la sperto diversas. Estas alia etoso legi la konatajn aventurojn esperante. Mi kun ĝojo pensas pri tiu interesa kurso.*

/Siv

## **Eta librorecenzo**

Ĝuste nun mi legas la detektivnovelaron "La naiveco de pastro Brown" de Gilbert Keith Chesterton el 1911, esperantigita de d-ro Cecil Bean en 1934. Chesterton skribis 48 novelojn pri pastro Brown, kaj la televida

Stokholmo de la 1940-aj jaroj estas io ekzotika.


Kaj por internacia legantaro? Inter ili eble "fyllda semlor" (fastobulktoj) ne povus vekti la veran profundan senton, eĉ se la tradukistoj trovas treege trafan tradukon. Kaj ĉu ili konas la anglajn detektivajn romanojn de pasinta tempo, pri kiuj la tuta Ture Sventon-mondo estas parodio?

Ekscitajn obstaklojn verŝajne spertas ĉiu tradukisto, sed multoble pli tiklaj la problemoj fariĝas kiam oni penas samtempe fari ion tiel ekstreme kulturspecifan kiel la Ture Sventona mondo enirebla por internacia legantaro serĉanta novajn spertojn, kaj samtempe fari ĝin hejmeca por svedoj, kiuj ne volas trovi siajn karajn "fyllda semlor" profanitaj pro internaciecaĉaj tradukpenadoj.

Nun Louise kaj mi preskaŭ plenumis la tradukon, kaj ricevis la rajton publikigi la tradukon.

**Se iu el la legantoj de Ora ĵurnalo volas helpi nin kontrollegi la libron – bonvolu skribi al la redaktoro aŭ al mi:**  
**carlolofselenius@hotmail.com**

Carl-Olof Selenius



serio "Father Brown" estas inspirita de liaj noveloj. Mi tre ĝuas legi la libron plena de angla et-urba etoso. Kiam mi finlegos ĝin, mi redonos ĝin al nia biblioteko en Stannum, por iu sekva prunto.

/Andreas

# Kara muŝo

Kiam vi estas sola mi bonvenigas vin kiel sendito anoncante venontajn varmajn tempojn.

Sed kiam venas amaso de vi – mi ne plu toleras vin.



*Sur la blanka muro*

*muŝo promenis tien – reen.*

*Kara muŝo*

*flugu ien – tien*

*kie mi vin ne plu vidos!*



Kiel knabino mi legis libron nomita Pollyanna. Ŝi estis orfino kaj ekloĝis ĉe sia onklino, kiu havas fortajn ideojn pri pureco.

Kiam Pollyanna foje malfermas fenestron en sia ĉambro, kelkaj muŝoj enflugas. Ŝi studas iliajn agadojn. La onklino eniras admonante Pollyannan tuj fermi la fenestron.

Ŝi ja antaŭe diris, ke Pollyanna ne rajtas malfermi la fenestron eĉ se estas varme. Kiel puno ŝi donas al Pollyanna libron pri muŝoj, admonante ŝin zorgeme legi ĝin. Post tempo la onklino volas ekscii, ĉu Pollyanna vere legis

la libron kaj la onklino pretas fari ekzamenon pri la enhavo. Radianta de ĝojo Pollyanna salutis sian onklinon. "Mi tre dankas vin pro la libro. Mi ne sciis ke eta muŝo povas porti tiom da bakterioj sur siaj piedoj. Estas vere interesa libro!"

La sinteno de Pollyanna estas tre unika. Ŝi turnas ĉiun malbonaĵon en iun bonecon.

Kiam la ekstera mondo estas kruela, indas legi Pollyannon 😊 /Siv

## Tiel aspektas la bulteno de la Londona Esperanta klubo



Inga Johansson estas scivolema pri aliaj esperanto-kluboj. Ĉi tie la londona klubo prezentas sin:

La Londona Esperanto-Klubo (LEK) celas antaŭenigi kaj uzi la internacian lingvon Esperanto. Ni kunvenas kaj ĉeeste en Highbury unufojon monate kaj virtuale semajne per la retprogramo Zoom, vendrede

je 19:00 (brita horzono). Trovu la plej ĝisdatan programon en nia bulteno. Okaze ni kunsidas virtuale kune kun la membroj de la Esperanto-klubo en Antverpeno.

Se vi volas partopreni en **la virtualaj Zoom-kunsidoj**, kontaktu nin:

<https://londonaesperantoklubo.com/Kontakto.html>



## Ekspozicio, en kiu ankaŭ Ora Ĵurnalo ĉeestas

Oni montras la ekspozicion en la bibliotekoj en la Kalmar-gubernio. En la vico estas Bohuslando.

Christer Wigerfelt, estrarano de Tidskriftsverkstan, informas nin. /Siv.

Tidskriftsverkstans roll-up-utställning består av elva lätt-placerade skärmar, en på 100 x 220 cm och tio stycken på 85 x 220 cm.



Imagu, ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo estas jam la 50a!



# Kelkaj pioniraj svedinoj

## 1. La opero-kantistino, Henriette Widerberg

**Henriette Sophie Widerberg** naskiĝis en 1796 en Stokholmo, kaj tie mortis en 1872. Ŝi estis sveda operkantisto (soprano), aktorino kaj verkistino.

Henriette Widerberg estis aktiva 1807–1843 kaj estas kutime rigardita kiel unu el la plej popularaj aktorinoj kaj la gvida opero primadono en Svedio inter 1820 kaj 1837.

**Kiel la unua virino en Svedio, ŝi publikigis siajn memoraĵojn: "La memoroj de aktorino" en 1850.**

La patro mortis kiam Henriette havis 14 jarojn. Ŝi travojaĝis kun diversaj teatraj grupoj i.a. tra Gotenburgo. Ŝi havis grandan sukceson, kiam ŝi aktorin en la reĝa teatro en Stokholmo 1817.

Ŝi neniam lernis notojn, sed la direktisto kaj muzikistoj bonvole devis doni al ŝi tempon por trejnado, kio kaŭzis multajn konfliktojn.

Ŝi ofte nuligis prezentojn pro diversaj kialoj kaj foje rifuzis ludi asignitan rolon. Fine ŝi estis maldungita. Tamen, la spektantaro postulis ke ŝi estu redungita Lige kun ŝia ekziĝo, ŝi estis nomumita kortega kantisto.

Ŝi rakontas en siaj memoraĵoj pri kiel admirantoj invitis ŝin al siaj domoj en la kamparo, kaj tie ili vestis sin kiel virinoj por

esti lasitaj en ŝian ĉambron. Foje iu provis ĵeti ŝin en Norrström (Norda torento), kiam ŝi malaprobis lin.

Kiam ŝi aperis kiel Zerlina en Fra Diavolo la 17-an de majo 1833, ŝi estis la unua virino kiu malvestis sin sur la scenejo, kiu ŝokis la gazeton: Malvesti sin tiam estis aperi en subvestoj, riĉaj je punktoj.

Same populara kaj admirata kiel ŝi estis en ŝiaj prosperaj tagoj, same forgesata ŝi estis en sia maljuna aĝo kaj ŝi mortis tre malriĉa. /Siv



*Henriette Widerberg en la rolo de Armide (1823).*

## 2. Sonja Kovalevskaja, profesoro pri matematiko.



ENGRAVED BY R. G. TIETZE, AFTER A RUSSIAN PRINT FROM A PHOTOGRAPH.

Sonja Kovalevskaja naskiĝis kiel Sofia Krjukovsky en Moskvo 1850.

**En 1882 ŝi estis nomumita profesoro en la universitato de Stokholmo kaj tiel iĝis la unua ina profesoro de Svedio kaj la unua profesoro de la mondo pri matematiko.**

En 1868 Sofia edziniĝis kun la paleontologo Vladimir Kovalevsky. Per la edziĝo Sofia ricevis viran kuratoron kaj do povis studi en Germanio. Sed virinoj ne rajtis partopreni publikajn prelegojn en Germanio. Tial ŝi bezonis privatan edukon, kiun ŝi ricevis de la matematikisto Karl Weierstrass.

En 1874 ŝi akiris doktorecon je la universitato de Göttingen.

Post la transloĝiĝo al Svedio 1881 ŝi ŝanĝis sian nomon Sofia en Sonja. Ŝi ricevis dungon kiel instruisto je la Altlernejo de Stokholmo. En 1884 ŝi fariĝis docento kaj en 1889 ŝi estis promociita profesoro je la sama altlernejo.

Dum la 19a jarcento virinoj ne rajtis havi ŝtatajn dungojn kiel profesoroj Tamen, la Altlernejo de Stokholmo estis privata. Tio ebligis ŝin aspiri oficon kaj ricevi ĝin. Ĉe la svedaj ŝtataj institucioj daŭris ĝis 1938 antaŭ ol virino nomumiĝis profesoro -- estis Nanna Svartz je la instituto Karolina.

En 1885, Sonja Kovalevsky estis nomumita kiel membro de la Reĝa Akademio de Sciencoj, sed ŝi ne estis elektita ĉar ŝi estis virino. En la sama jaro ŝi iĝis membro de la virina kultura asocio Nya Idun kaj en 1887 ŝi estis elektita al la Societo De 17, kiun fondis Gösta Mittag-Leffler. En 1888, al Sonja

Kovalevsky estis premiita per la prestiĝa Prix Bordin fare de la Franca Akademio de Sciencoj.

Sonja Kovalevsky ankaŭ estis romanverkisto, kaj havis kontakton kun pluraj el la tiamaj famaj verkintoj, kiel ekzemple Dostojevskij, Ibsen kaj Strindberg.

Ŝi interalie verkis la dramon "La lukto por feliĉo" kune kun Anne-Charlotte Leffler, fratino de Gösta Mittag-Leffler. Ŝi ankaŭ skribis pri sia infanaĝo kaj postlasis plurajn literaturajn verkojn, inkluzive de la romano "Vera Vorontzoff", kiu estis publikigita postmorte fare de Ellen Key. Sonja Kovalevskij iam diris: "Estas neeble esti matematikisto sen esti poeto en la animo".

En 1891, Sonja Kovalevsky mortis pro pulminflamo en la aĝo de 41. Ŝi estas entombigita ĉe la Norda tombejo en Solna, Stokholmo.

/Siv

## Maljunuloj ekzerciĝas en Ĉinio. El maljunulejo.

Sendita al ni de Josef Kříž, Ĉeĥio



1. Virino svingas sin en la arbon. 2. Viro havas du pezajn sakojn, kiujn li rondiras per stango sur sia kapo 3. Viro "biciklas" ne tuŝante la teron.



Troviĝas multaj eĉ pli aŭdacaj ekzercoj kiel la jena →

Tamen, mi ne volas malkuraĝigi la svedajn maljunulojn, kiuj regule frekventas gimnastikejojn.

*Ŝajnas ke ĉinoj ĝenerale estas tre sanaj – se ne estus la kovo, kiu ĵus trafis parton de la lando denove.*

*/Siv*

## Indas montri arton, Torben Svendsen, Danio, asertas

*Jes, pri tio mi konsentas. Dankon Torben! /Siv*



Jen "Arto en la mondo". Artisto:  
Nubia-Alunes Sobra!  
<https://youtu.be/YtcpDvRDOaI>

**FILMIGO**

## 11 – dek unu

Ivano naskiĝis en kampara domo apud eta vilaĝo en suda parto de la lando. Li havis 10 gefratojn kaj li estis la plej juna – tial oni konis lin kiel la "dekunuan". Lia patro estis instruisto en vilaĝa lernejo. Li instruis la infanojn kiel bele manskribi. Ivano kaŝe ekfumis nur 11 jara kaj fumis, fumadis ĝis la pulmokancero forprenis lin je aĝo 63.

Annio naskiĝis en loko multe pli norde en la lando. Ankaŭ ŝi havis 10 gefratojn, sed ŝi ne estis la plej juna, ie meze. La patrino de Annio

havis brunajn okulojn kaj la patro havis bluajn. Bedaŭrinde li estis blinda post akcidento dum milita servo. Annio havis bluajn okulojn, kiel kelkaj gefratoj, aliaj havis brunajn. Sed fratino Elinjo havis unu bluan kaj unu brunan okulojn.

La unua laboro de Annio estis en bieno kun multe da bovinoj. Tie ŝi prizorgis la bovinojn kaj preparis la lakton por vendi al la vilaĝanoj. Apud tiu vilaĝo loĝis Ivano. Li ekamis Annion. Frue en la jaro 1911 ili geedziĝis kaj transloĝis

al eta urbo je 11 kilometroj apud pli granda urbo. En novembro 1911 naskiĝis la unua infano, filo. Kelkajn jarojn poste, la dua infano – filino. Ivano kaj Annio ne volis infanaron, ili ja havis grandajn gefratarojn. Do en la jaro 1922 venis la lasta, la tria infano, filino. Inter la unua kaj lasta infano estis nun 11 jaroj.

Ivano laboris en oficejo, li prizorgis la ekonomion de eta firma. Annio vendis en butiketo glaciaĵojn, maĝgumojn kaj dolĉajn kuketojn.

Ivano ne estis alta – li estis ronda, kaj kalva kapo kaj stomako.

En la jaro 1949, dum la tago 11an de marto li estis en malsanulejo kaj apud la lito sidis lia plej juna filino, Manjo kaj prizorgis lin ĝis lia lasta spiro.

En la jaro 1960, dum la tago 11an de marto Annio preparis sin por gasto, la amikino venos. Tamen pro koratako ŝi falis morte sur vestibla planko. La amikino venis kun granda bela florbukedo, sonoris je la pordo sed neniu malfermis. Do ŝi lasis la bukedon ekster la pordon kaj iris hejmen. Post kelkaj horoj venis la nepino de Annio, kiu ankaŭ loĝis tie, hejmen de sia lernejo. Unue ŝi trovis la belajn florojn ekster la pordon kaj tiam ŝi trovis sian mortan avinon surplanke intere. Kia ŝoko por dekkvara junulino!

Do inter la mortoj de Ivano kaj Annio estis 11 jaroj – je 11a de marto. Alia parenicino mortis 11an de marto 1969 – kaj la usona esprimo "nine-eleven" havas sian signifon.

/Inga Johansson

## Printempa promeno kun Kal kaj Ada

de Ingegerd Granat

Kal kaj Ada transiris "Kämpebron", (la ponto de batalantoj), kaj iras laŭ Norra Hamngatan rekte al la granda limigita laborareo.

– Sed estas Pozidono mem, kiu staras tie kaj invitas nin al printempa promeno, diras Kal al Ada kaj ili tuj decidas sekvi. *"Oh, what a big big boy ..."*

Imagu, kia ĝojo – sub radianta suno vi povas promeni laŭ la kajo, diras Ada reveme.

Pozidono, kiu ĵus deiris de la tabulo, sur kiu li estis pentrita, staras antaŭ ili kaj diras: *"Vi estas bonvenaj al Gotenburgo!"*

– Estas la Transatlantika Domo kaj apud ĝi estas Broströms, nun la Apelacia Kortumo,



Sten-Åke Cederhök kaj Sonja Hedenbratt kiel "Kal kaj Ada".

bone aŭ malbone, kaj trans la strato troviĝas la hodiaŭa Kazino, diras Pozidono dum li montras ĉiun el la majestaj domoj. Pozidono, kiu estas la reganto de la maroj, sentas sin tre bone ĉi tie malsupre sur Packhuskajen, kie komenciĝis tiom da marvojaĝoj. Ĉu vi

akompanos nin dum vojaĝo malsupren apud la kajo, li diras al Kal kaj Ada.

– Jes, kompreneble, diras Kal kaj turnas sin al Ada *"Venu, amikino, ni veturos ..."*, tiam li prenas Ada ĉirkaŭ la talio kaj valsas post la granda mardio. ›



*Pozidono sur la muro ...*

› La promeno daŭras laŭ la kajo kaj tie ili estas, la du malnovaj kanalboatoj Juno kaj Wilhelm Tham kiuj ankoraŭ havas siajn vintrajn mantelojn.

– Ne estas tempo por iaj boataj vojaĝoj ĉi-jare, diras Pozidono.

– Sed verŝajne vi povas iri per Älvsnabben, diras Ada. Mi faris tion multfoje. Ĝi estas sekura kaj oportuna kaj malmultekosta.

– Jes, ĉu vi memoras, kiam ni iris la tutan vojon al Klippan kaj ni sidis ĉe Röda Sten kaj kantis *"Saluton, vi maljuna indiano"*?

– Jes, kaj ni havis la kaftermoson kun ni kaj rigardis Stenabåten kiu estis survoje al la kajo ... jes estas agrable reveni, Kal respondas.

– Jes estis tiam, kiam Sonya Hedenbratt preterjasis kaj prenis tason. *"Ŝi kvazaŭ antaŭenpuŝis sin"* ni povus diri. Ŝi estis survoje al la danco sur *"Brännö-ponto"*.



– Jes, estis tempoj, diras Kal.

Nun ni transiru al la alia direkto! Pozidono montras per sia tuta mano al la Opero.

– Sed ĉi tie ili certe provludas por tiu datreveno, kiu eble neniam efektiviĝos...

– Jes, mi aŭdas tion ... ni povas kanti kune ...

– Jes, ni faras, ĝi estas ankoraŭ nia melodio.

– Sed *“ni verŝajne povas fari ĝin ĉiuokaze”*...

Pozidono ŝajnas malpacienca, verŝajne estas la akvo, kiu maltrankviligas lin. Li volas malsupreniri al la malnova boatmuzeo kun submarŝipoj kaj ĉiuj aliaj specoj de ŝipoj. Ili ondetas kontraŭ la kajo kaj li vidas kelkajn flavajn laboristojn marŝi iom sencele kaj tirante dikan, oranĝan hoson... La diabla *“Västlänken”*, (la okcidentan ligilon), Pozidono murmuris.



Sed tial oni vidas lin en la haveno, la mardion, kaj li ne nur staras kaj *“nestas”* sur Götaplatsen inter *“Kreti kaj Pleti”*. Ene de la barilo staras tre malnovaj boatvrakoj, kiuj estis trovitaj en la argilaj masoj. Kiam ni forlasis la muzeon, ekpluvas kaj Pozidono diras: Ni devas havi pluvvestojn kaj mi bezonas almenaŭ ŝtormoĉapelon, por ke mi ne perdu la koloron!

Mi konas amuzan butikon, iom pli for ĉe la barko *“Viking”*. – Ni iras tien, diras Kal.

Ĝi havas vere amuzan reklamon *“je bela tago pluas”* kaj ankaŭ nomiĝas *“Plums”* (Pum)! *“Ho boj, ho boj ho boj ...”*!

– Tiam ni iras al *“La Kajo de Songĝoj”* kaj rigardas ĉiujn songĝojn, kiuj ricevis *“Slackifocken”* (malstreĉo je la antaŭvelo), diras Kal. Subite aŭdiĝas granda plaŭdo, kiam ili ĉirkaŭrigardas, ilia granda gvidanto sin ĵetis en la maron, la granda Pozidono jam estas duonvoje al Hisingen. Tiam nur

ni, kiuj iras al la rubboatoj kiuj atendas riparon aŭ estos rubo.

Nun komencas malheliĝi kaj la siluetoj de la boatoj estas bele videblaj en la lunlumo.

*"Luno, nia maljuna amiko, vi, kiu tiel bone konas la amon".*



## La 100 plej legindaj tradukaĵoj

estas listo kompilita de Edmund Grimley Evans. Titoloj kun **ruĝa numero** troviĝas en la biblioteko en Stannum.

**1.** Amado: **La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko** (1959, portugala, tr. Pádua). Kinkas, mortinta, ekskursas kun nerespektindaj kamaradoj.

**2.** Andersen (1805-1875): **Fabeloj** (dana, tr. Zamenhof). Famaj fabeloj, kaj grava specimenaro de zamenhofs lingvaĵo.

**3.** Ariyosi Sawako: **La edzino de kuracisto Hanaoka Seisyū** (1966, japana, tr. Konisi Gaku). Malfacilaj rilatoj inter bofilino kaj bopatrino ĉirkaŭ 1800.

**4.** Asch: **La sorĉistino el Kastilio** (1921, jida, tr. Lejzerowicz). La suferoj de juda martirino en Romo ĉirkaŭ 1500.

**5.** Aszlányi: **Sep vangofrapoj** (1937, hungara, tr. Somlai). Amuza romano. Senlabora inĝeniero venĝas al potenca ŝtalreĝo.

**6.** Atxaga: **Memoraĵoj de eŭska bovino** (1991, eŭska, tr. Arana). Misteraj okazaĵoj en apudmontara bieno, el la vidpunkto de bovino.

**7.** Baudelaire: **La floroj de l' malbono** (1857, franca, tr. diversaj). Poemaro pri sekso kaj morto kaj la tragedio de senespera solulo.

**8.** Bengtsson: **Orm la ruĝa** (1941-1945, sveda, tr. Nilsson). Aventuroj en la deka jarcento, en humura pseŭdoarĥaika stilo.

**9.** Boccaccio: **Dekamerono** (1350-1353, itala, tr. Waringhien kaj Martinelli). Tri dekonaj el eble la plej konata novelaro de la monda literaturo.

**10.** Borges (1899-1986): **La sekreta miraklo** (hispana, tr. diversaj). Elektitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj de la fama argentina verkisto.

**11.** Borovský: **La bapto de caro Vladimir** (1855, ĉeĥa, tr. Pumpr). Satira kaj amuza versaĵo pri la unua kristana caro.

**12.** Brecht: **Trigroŝa romano** (1934, germana, tr. Schulze). Socikritika romano de la fama poeto kaj dramisto.

**13.** Bulgakov: **La majstro kaj Margarita** (1966, rusa, tr. Pokrovskij). Moderna klasikaĵo pri Moskvo, Jerusalemo kaj balo ĉe Satano.

**14.** Buzzati: **La dezerto de la tataroj** (1940, itala, tr. Mistretta). Soldatoj tutvive atendas malamikon, kiu neniam venas.

**15.** Cabell: **Jurgen** (1919, angla, tr. Auld). Fantazia vojaĝo de iama poeto. Libro tre ŝatata de William Auld.

- 16.** Camus: **La fremdulo** (1942, franca, tr. Duc Goninaz). Akcidenta murdinto bedaŭras nenion.
- 17.** Capuder: **La vipo kaj la turbo** (1975, slovena, tr. Ošlak). La unua "disidenta" romano en Slovenio traktas amarajn spertojn el 1941-1945.
- 18.** Carroll: **Alico en Mirlando** (1865, angla, tr. Broadribb). Klasika infanlibro verkita de matematikisto.
- 19.** Céline: **Vojaĝo ĝis noktofino** (1932, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Cinika kaj komika atako kontraŭ patriotismo kaj aliaj ismoj.
- 20.** Cervantes: **La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha** (1605-1615, hispana, tr. de Diego). Ĉefverko mondliteratura, moka kaj farsa, iom neologisme tradukita.
- 21.** Chesterton: **La naiveco de pastro Brown** (1911, angla, tr. Bean). Dek du rakontoj pri pastro-detektivo kun metodoj pli intuiciaj ol deduktaj.
- 22.** Conan Doyle: **La ĉashundo de la Baskerviloj** (1902, angla, tr. Auld). Fama aventuro de la rigore racia detektivo Ŝerloko Holmso.
- 23.** Couperus (1863-1923): **Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj** (nederlanda, tr. Berveling). Noveloj por prezenti la buntan temaron de nederlanda verkisto.
- 24.** Čapek: **Milito kontraŭ salamandroj** (1936, ĉeĥa, tr. Vondroušek). Satira sciencfikcio pri la malkovro, sklavigo kaj ribelo de fremda raso.
- 25.** Ĉeĥov (1860-1904): **Ĉeriza ĝardeno** (rusa, tr. diversaj). Elektitaj verkoj de eminenta novelisto.
- 26.** Dante: **Infero** (1308-1321, itala, tr. Kalocsay / Dondi). Dondi tradukis ankaŭ la tutan Dian Komedion. Klasikaĵo pli legebla, eble, ol vi pensas.
- 27.** Daudet: **Tre mirigaj aventuroj de Tartarin de Taraskono** (1872, franca, tr. Delor kaj Le Brun). Burleskaj aventuroj de provenca fanfaronulo.
- 28.** Dostojevskij: **Krimo kaj puno** (1866, rusa, tr. Parfentjev). Fama kaj influa romano pri studento, kiu murdas lombardistinon.
- 29.** Dumas: **La grafo de Monte-Kristo** (1844, franca, tr. Moirand). Romanego plena de intrigoj, perfidoj, murdoj kaj venĝoj.
- 30.** Eliade: **Fraŭlino Maitreyi** (1933, rumana, tr. Onet). Pri malpermesita amo inter juna eŭropano kaj eĉ pli juna bengalino.
- 31.** Fournier: **La granda Meaulnes** (1913, franca, tr. Bernard). Pri "la verda paradizo de amoj knabnaivaj".
- 32.** Frank: **Taglibro de Anne Frank** (1942-1944, nederlanda, tr. Bartels). Taglibro de 13-jara juda knabino, vivanta kaŝite sub nazia okupado.
- 33.** García Lorca: **Cigana romancaro** (1928, hispana, tr. de Diego). Bonega traduko de ŝatata hispana poemaro.
- 34.** García Márquez: **Cent jaroj da soleco** (1967, hispana, tr. de Diego). Populara magirealista romano tradukita en Diegan dialekton.
- 35.** Gárdonyi: **Sklavoj de dio** (1908, hungara, tr. Hamvai). Pri sankta Margareta (1242-1271) kaj la peniga vivo de monaĥoj.
- 36.** Gogol: **Malvivaj animoj** (1842, rusa, tr. Vyĉegjanin). Nova alveninto trompe aĉetadas mortintajn servutulojn.
- 37.** Grimm: **Elektitaj fabeloj** (1812, germana, tr. Bein). Klasika traduko de klasikaj popolfabeloj.
- 38.** Harrison: **Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato** (1985, angla, tr. diversaj). Humura sciencfantazio. Aventuroj de ŝatinda fripono.
- 39.** Hašek: **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito** (1923, ĉeĥa, tr. Váňa). Ĉeĥa soldato subfosas la aŭstrian-hungarian armeon per ŝajna malkompetenteco.
- 40.** Heine (1797-1856): **Kantoj kaj romancoj** (germana, tr. Kalocsay kaj Waringhien). Formfidelaj kaj belaj poemtradukoj en klasika, parnasisma lingvo.

- 41.** Hemingway: **La oldulo kaj la maro** (1951, angla, tr. de Diego). Maljuna kuba fiŝkaptisto luktas kontraŭ giganta fiŝo.
- 42.** Ihara Saikaku: **Kvin virinoj de amoro** (1686, japana, tr. Miyamoto). Noveloj pri tragedia amo en la feŭda socio.
- 43.** Jansson: **Muminvalo** (1962, sveda, tr. Bick). Furora infanlibro por ĉiuj aĝoj.
- 44.** Jeluŝiĉ: **Cezaro** (1929, germana, tr. Rotkviĉ). Historia romano pri la romia imperiestro.
- 45.** Jerome: **Tri homoj en boato** (1889, angla, tr. Badash). Komedia romano, kiu malgraŭ sia aĝo ŝajnas tute moderna.
- 46.** Jiménez: **Platero kaj mi** (1914, hispana, tr. Gutiérrez Adúriz). Andaluza vilaĝo priskribita per dialogoj kun azeno.
- 47.** Kafka: **La metamorfozo** (1915, germana, tr. Nervi). Gregor trovas sin en sia lito transformiĝinta en monstran insekton.
- 48.** Kajjam (1048-1131): **La robairoj** (persa, tr. Waringhien). Versaĵoj kun filozofia enhavo.
- 49.** Kalevala (1849, finna, tr. Leppäkoski). La finna nacia eposo en sorĉa traduko.
- 50.** Kawabata: **Neĝa lando** (1935-1948, japana, tr. Konisi Gaku). Pri amrilato inter tokia riĉulo kaj provinca geĵŝo.
- 51.** Kertész: **Sensorteco** (1975, hungara, tr. Ertl). Kapta kaj profunda rakonto pri juda knabo en Auschwitz kaj Buchenwald.
- 52.** Kiŝon (1924-2005): **Elektitaj satiroj** (hebrea, tr. Ziegler). Tridek humuraj skizoj en simpla kaj klara lingvaĵo.
- 53.** Kivi: **Sep fratoj** (1870, finna, tr. Ekström). Humura romano pri vivo en nordaj praarbaroj en la 19-a jarcento.
- 54.** Lagerlöf: **La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson** (1906-1907, sveda, tr. Johansson). Bubo ŝanĝiĝas en koboldon kaj flugas tra Svedio kun anseroj.
- 55.** Laŭ Ŝe: **Kamelo Ŝjangzi** (1936, ĉina, tr. Ŭang Ĉongfang). Pri la tragedia sorto de pekina rikiŝisto.
- 56.** Laxness: **Sendependaj homoj** (1934-1935, islanda, tr. Ragnarsson). Pri la kredoj kaj vivoj de malriĉaj islandaj kamparanoj.
- 57.** Lindgren: **La beleco de Merab** (1983, sveda, tr. Johansson). Deko da noveloj kun nord-sveda fono.
- 58.** Lukiano: **Lukio aŭ azeno** (ĉ. 170, greka, tr. Berveling). La plej malnova teksto en la listo. Humura rakonto pri viro ŝanĝita en azenon.
- 59.** Lusin (1881-1936): **Noveloj** (ĉina, tr. diversaj). Enrigardo al la ĉina socio dum interesa historia periodo.
- 60.** Mann: **La morto en Venecio** (1912, germana, tr. Buinsters). Germana verkisto iĝas obsedita de juna pola knabo dum ĥolera epidemio.
- 61.** Martinson: **Aniaro** (1956, sveda, tr. Auld kaj Nilsson). Eposa poemo pri paneinta kosmovojaĝo. Majstroverko ne sufiĉe konata.
- 62.** Mickiewicz: **Sinjoro Tadeo** (1834, pola, tr. Grabowski). Klasika traduko de la pola nacia epeo.
- 63.** Milne: **Winne-la-Pu** (1926, angla, red. Tonkin). Klasika infanlibro bele esperantigita.
- 64.** Miyazawa Kenzi (1896-1933): **Gooŝ la ĉelisto** (japana, tr. Nozima). Fantaziaj noveloj kaj fabeloj.
- 65.** Mori (1862-1922): **Rakontoj de Oogai** (japana, tr. diversaj). Kvar noveloj.
- 66.** Nothomb: **Higieno de l' murdisto** (1992, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Ĵurnalistino intervjuas mortontan mizantropan verkiston.
- 67.** Orwell: **Mil naŭcent okdek kvar** (1949, angla). Klasikaĵo pri totalisma socio, laŭdire jam dufoje esperantigita.
- 68.** Orzeszko: **Marta** (1872, pola, tr. Zamenhof). Pri junulino luktanta por digna vivo.
- 69.** Poe: **La falo de la domo Usher** (1839, angla, tr. Grimley Evans). Simbolisma hororo pri ĝemela fratino entombigita vivanta.
- 70.** Prus: **La faraono** (1895, pola, tr. Bein). Historia romano pri la antikva Egiptio.
- 71.** Puŝkin: **Eŭgeno Onegin** (1825-1837, rusa, tr. Valentin Melnikov). Versromano, kvazaŭ "enciklopedio de la rusa vivo".
- 72.** Queneau: **Stilekzercoj** (1947, franca, tr. Ertl). Naŭdek naŭ diversstilaj raportoj pri la sama okazaĵo.

**73.** Radiguet: **Kun Diablo en la korpo** (1923, franca, tr. Duc Goninaz). Eleganta amromano pri rilato inter edzino kaj 16-jara knabo.

**74.** Ramos: **Vivoj sekaj** (1938, portugala, tr. Knoedt). Batalo de malriĉa familio kontraŭ sekeco kaj malsato en nordorienta Brazilo.

**75.** Remarque: **En okcidento nenio nova** (1929, germana, tr. diversaj). Pri la suferado de soldatoj en la mondmilito.

**76.** Sagao de Njal (ĉ. 1250, islanda, tr. Ragnarsson). La plej elstara islanda sagao, pri eventoj inter 960 kaj 1020.

**77.** Saint-Exupéry: **La eta princo** (1943, franca, tr. Delaire). Fabela rakonto ne nur por infanoj.

**78.** Saki (1870-1916): **La lupino kaj aliaj rakontoj** (angla, tr. Grimley Evans). Spritaj kaj satiraj rakontoj en eleganta stilo.

**79.** San-Antonio: **La maljunulino kiu paŝis en la maro** (1988, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Maljuna aventuristino elektas heredanton kaj instruas lin pri ŝtelarto.

**80.** Sartre: **La naŭzo** (1938, franca, tr. Bernard). Ŝlosila verko de ekzistismo. Tridekjara historiisto naŭziĝas pri sia vivo.

**81.** Schnitzler: **Sonĝonovelo** (1926, germana, tr. Duc Goninaz). Sonĝeca erotika rakonto aluda al la sonĝinterpretado de Freŭdo.

**82.** Selimović: **La derviŝo kaj la morto** (1966, serbokroata, tr. Imbert). Religiulo en Bosnio dum la turka regado ĵetiĝas en politikan potenclukton.

**83.** Shakespeare: **Hamleto, reĝido de Danujo** (ĉ. 1600, angla, tr. Zamenhof). La unua esperantigo de Ŝekspiro, kaj ankoraŭ leginda.

**84.** Shi: **Ĉe akvorando** (ĉ. 1370, ĉina, tr. Laŭlum). Romanego pri kamparana ribelo ĉirkaŭ 1120.

**85.** Sienkiewicz: **Quo vadis?** (1895, pola, tr. Lidja Zamenhof). Historia romano pri Romo sub Nerono.

**86.** Simenon: **La flava hundo** (1931, franca, tr. Luez). Unu el pluraj krimromanoj pri komisaro Maigret jam esperantigitaj.

**87.** Stevenson: **D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde** (1886, angla, tr. Goodheir / de Diego). Elektu el du tradukoj de rakonto pri apartigo de la du flankoj de unu persono.

**88.** Strindberg: **Insulanoj de Hemsö** (1887, sveda, tr. Johansson). Pri la rilatoj amaj kaj geedzaj inter homoj malsamklasaj.

**89.** Tagore (1861-1941): **Malsata ŝtono** (bengala, tr. Sinha). Sep rakontoj spegulantaj la morojn kaj homtipojn bengalajn.

**90.** Tammsaare: **La mastro de Kõrboja** (1922, estona, tr. Kärt). Juna bienestrino provas edzigi al si filon de apuda bienulo.

**91.** Tolkien: **La Mastro de l' Ringoj** (1954-1955, angla, tr. Auld). Popularega trivoluma fantazia romano.

**92.** Tolstoj: **Resurekto** (1899, rusa, tr. Sapoĵnikov). Pri la maljusteco de leĝoj kaj la hipokriteco de la eklezio.

**93.** **Tragedio en la universo** (1961, kroatserba, tr. Rotkvić). Kolektiva verko de junaj astronomoj. Eksterteranoj vizitas la detruitan Teron.

**94.** Turgenev: **Patroj kaj filoj** (1862, rusa, tr. Bein). Pri diferencoj inter generacioj en la tempo de la fino de servuteco.

**95.** Vazov: **Sub la jugo** (1889, bulgara, tr. diversaj). Historia dramo pri luktado kontraŭ turka regado ĉirkaŭ 1875.

**96.** Vermeulen: **La migranta judo** (1906, nederlanda, tr. Declerck). Rakonto el la tempo de Kristo.

**97.** Verne: **Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj** (1873, franca, tr. Tortel). Ŝatata romano pri aventura vojaĝo.

**98.** Voltaire: **Tri verkoj de Volter** (1747-1767, franca, tr. Lanti). Tri gravaj verkoj en unu volumo: **Kandid**; Zadig; Senartifikulo.

**99.** Wells: **La dormanto vekigis** (1910, angla, tr. Milward). Post 203-jara dormo, viro vekigis en socio por li fremda.

**100.** Zweig: **Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj** (1911, germana, tr. Schwerin). Dekdujara knabo intervenas kontraŭ la amanto de lia patrino.